

# HORIZONTO

IV-a JARO N-o 21 (3)  
MAJO - JUNIO 1979

KULTURA KAJ INFORMA REVUO



ATENO: DIONIZIO KATEDRALO

MEDITIGA INFORMO

BELETRO

RAKONTO PRI JUDA FORĜISTO KAJ TIES EDZINO

DE LA NEŬTRALA ESPERANTO MOVADO

# HORIZONTO

Direktorino  
Inés Gastón  
Redakta Komitato  
Salvador Gumá  
Juan Régulo  
Jean Thierry  
Red. kaj Adm.  
Inés Gastón  
P.º Marina Moreno, 35  
Telf. (976) 22.05.21  
Zaragoza-1 (Hispanujo)  
Eldonkvanto 1.000 ekzempleroj  
Dumonata revuo  
Presita en Zaragoza  
ĉe "Tipografía C. Boloix"  
str. Reina Fabiola, 7, Zaragoza-8  
Leĝa Depono Z-133-76

N.º 3 - Majo - Junio 1979

## ENHAVO

LA KONCEPTO DE NEŬTRALECO EN  
INTERNACIAJ RILATOJ KAJ INTERNA-  
CIA JURIO (Ivo Lapenna)

PORTURISTAJ KOMPUTEROJ (Jean  
Thierry)

OMAGE

PROTESTOJ TRA LA FRANCA GAZETA-  
RO (Jean Thierry)

MEDITIGA INFORMO (Komentas  
I. Gastón)

IOM PRI LA KONFERENCA DISTRA  
PROGRAMO

BELETRO

Ne sufiĉas (trad. Gabriel Mora i Arana)  
Amrompo (trad. N. Z. Maimon — G. Wa-  
ringhien)

RAKONTO PRI JUDA FORĜISTO KAJ  
TIES EDZINO (Trad. Georges Salan)

SUSPEKTITA PRI ESKAPO (trad. Jan  
Smykalski)

IDUS MARTIE (Zora Heide)

EL NIAJ FAKAJ ORGANIZAJĜOJ

Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj  
(IEAJ)

TRA LA ESPERANTO-GAZETARO (Ra-  
portas: Jean Thierry)

LIBROJ SUB LA LUPEO (Recenzas Sal-  
vador Gumá)

## KIEL ABONI?

Abonojn al "Horizonto" akceptas la Ad-  
ministracio: Inés Gastón, Paseo Marina  
Moreno, 35, Zaragoza-1, Hispanujo. Pĝk.  
Zaragoza 00428398 (Jarabono 500 ptoj.), aŭ  
la sekvantaj.

## PERANTOJ

Aŭstrujo:  
Dro. Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020  
GRAZ. Pĝk. Graz 1257.845. Jarabono:  
160,— S.

Britujo:  
Geoffrey King, 14 Elmdale Road, LONDON  
N13 4UL. Pĝk. 37.507.9106. Jarabono 5 £.

Danlando:  
Peter Zacho, Nørregardsvej 91, DK-2610  
RØDOVRE, Pĝk. 6287859. Jarabono: 60,—  
D Kr.

Finlando:  
Finna Esperanto-Librejo, PL 221, SF-70101  
KUOPIO 10, Pĝk KU 152801-5. Jarabono:  
38,— F. Mk.

Francujo:  
André Bourdeaux, 91 rue de la Chapelle,  
F-75018 PARIS. Pĝk. Paris 21.670.96 V.  
Jarabono: 40,— Fr.

FR Germanujo:  
Heinrich Müller, Mommsenstrasse 5,  
D-3000 HANNOVER 1. Pĝk. Hannover 120  
854-301. Jarabono: 24,— DM.

Grekujo:  
Adda Sakelaropoulou, Sokratous 88 Omo-  
nia, ATHENO 101. Jarabono: 380,— Grekaj  
Drakmoj.

Israelo:  
Ben-Alter Jehiel, P. O. B. 379, PETAH  
TIKVA. Pĝk. Bank Hadoar, 4-45854-8.  
Jarabono: 84 izr. liroj.

Jugoslavio:  
D-ro Oton Pancer, Voĉarsko Naselje 10,  
YU-41000 ZAGREB. Jarabono: 180 n. din.

Kanado:  
Kriss Smilga, 34 Martin Road. TORONTO  
Ont. M4S 2V2. Jarabono: 10,— \$.

Luksemburgo:  
Wickler Albert, OLM. Pĝk. 54175-49. Jara-  
bono: 380 lfr.

Rumanujo:  
Mihail Petre Dungeanu, P.O. Box 502  
R-5806 SUCEAVA.

El ĉiuj aliaj landoj oni pagu al unu el  
tiuj perantoj, ĝis peranto en tiu lando  
estos trovita. Personoj pretaj funkcii kiel  
perantoj, bv. sin turni al la direktorino.

## PLEJ GRAVAJ VERKOJ

Eldonejo: PLAZA & JANES, S. A.  
E SPLUGAS DE LLOBREGAT  
(Barcelona - Hispanujo)

## LA KONCEPTO DE NEŬTRALECO EN INTERNACIAJ RILATOJ KAJ INTERNACIA JURO

(Redakcia noto: Dum la 4-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, Prof. I. Lapenna faris prelegon pri neŭtraleco, neŭtraligo kaj la kunligitaj nocioj en la nuntempaj internaciaj rilatoj kaj internacia publika juro. En la unua parto la preleginto prezentis la etimologion kaj signifojn de la radikoj neŭtr-a kaj neŭtral-a en diversaj lingvoj, inkluzive Esperanton. La dua kaj tria partoj estis dediĉitaj al konciza historia trarigardo pri la apliko de tiuj konceptoj en interŝtataj rilatoj, kaj al iom pli detalaj analizoj de kelkaj tipaj kazoj /Svislando, Belgio, Luksemburgo, Aŭstrio, Laoso/. Sekvis la kvara parto kaj konkludo. Kun la escepto de la enkondukaj kaj konkludaj vortoj, la kompleta teksto de la prelego aperos en n-ro 1/79 de IJR. Pro la eksterordinara graveco de la demando, precipe en ligo kun la nova statutprojekto de UEA, la redakcio ĉi-sube publikigas resumon de la kvara parto kaj la tutan konkludon. — La Redakcio.)

### Politika kaj juraj signifoj

Necesas doni kelkajn klarigojn pri la esencaj signifoj de la esprimoj «politiko de neŭtraleco», «neengaĝiĝo», «konstanta neŭtraleco», «neŭtraligo» kaj «neŭtralismo» kiel fakaj terminoj en internacia politiko kaj internacia juro.

Politiko de neŭtraleco estas jure nedeleviga, fakta aŭ deklarita, senpartieca sinteno de ŝtato rilate ian internacian situacion, malkonsenton aŭ konflikton, inkluzive militon. Ĉar la koncerna ŝtato ne estas jure ligita, ĝi povas ĉiumomente libere ŝanĝi sian politikon kaj preni pozicion neneŭtralan, nome politike apogi iun el la flankoj aŭ subteni difinitan solvon de konflikta situacio. Unuflanka ŝanĝo de la politiko de neŭtraleco ne estas malobservo de internacia juro. Kvankam jure nedeleviga, tamen la politiko de neŭtraleco devas esti respektata de la militantaj partioj en kazo de milito. Ĝi kaŭzas internacijurajn sekvojn dum la koncerna ŝtato mem observas tian politikon. Svedio sukcesis respektigi sian politikon de neŭtraleco dum la Dua Mondmilito, sed Norvegio, Danlando, Nederlando, Belgio k.a. ŝtatoj, kiuj tuj komence de la milito, en septembro 1939, deklaris sian neŭtralecon kaj oficiale komunikis la deklaron al la militantaj ŝtatoj, ne sukcesis.

Post la Dua Mondmilito formiĝis aparta tipo de politiko de neŭtraleco, konata nun kiel «neengaĝiĝo». Ĝia ĉefa iniciatinto kaj nuna apoganto estas la Prezidanto de SFR Jugoslavio, J. Broz-Tito, kiu sukcesis arigi ĉirkaŭ tiu koncepto konsiderindan nombron da ŝtatoj. La neengaĝiĝo rilatas nur al la du grandaj politikaj-militaj blokoj gvidataj de la du superpotencoj: tiu de la Nordatlantika Traktato ĉepinte kun Usono, kaj tiu de la Varsovia Pakto sub la rego de Soveta Unio. Pro la heterogeneco de tiu grupo de ŝtatoj, ilia fakta politiko koncerne multajn demandojn de la monda politiko, eĉ rekte tuŝantajn la neengaĝiĝon, ofte diverĝas kaj kaŭzas problemojn. Neengaĝiĝo, kiel aparta formo de iaspeca neŭtraleco, en pluraj kazoj fakte montriĝis malneŭtrala «neŭtraleco». Ankaŭ neengaĝiĝo estas jure nedeleviga: neengaĝita ŝtato povas en kiu ajn momento forlasi la grupon kaj aŭ aliĝi al unu el la blokoj, aŭ konduki sian propran, sendependan politikon de neŭtraleco.

Neŭtralismo estas nova termino, enkondukita antaŭ nelonge, per kiu kelkaj politikistoj kaj politiksciencaj specialistoj nomas pli nuancitan neengaĝiĝon. Ĝi indikas pli longdaŭran politikon de iu ŝtato ne implikiĝi en kiun ajn konflikton aŭ defendan aliancon.

Politiko de neŭtraleco povas konduki al formala unuflanka jura akto, per kiu ŝtato oficiale deklaras sian *konstantan neŭtralecon*. Plej taŭge tio povas esti farita per regulo en la konstitucio. Aŭstrio deklaris sian konstantan neŭtralecon per Konstitucia Akto. Ne nur la grandaj potencoj, sed ankaŭ aliaj ŝtatoj rekonis tion. Tiamaniere Aŭstrio fariĝis neŭtraligita ŝtato. Alia postmilita kazo estas tiu de Laoso, kiu per unuflanka Akto pri Neŭtraleco de la 9-a de julio 1962 deklaris sin konstante neŭtrala. Nur poste, per la Dektri-Potencia Deklaracio de Genevo de la 23-a de julio 1962, la 13 ŝtatoj (inter kiuj PR Ĉinio, Usono, Soveta Unio, Hindio, Britio kaj Francio) deklaris, ke la suvereneco, sendependeco, neŭtraleco, unueco kaj teritoria integreco de Laoso estas garantiitaj kaj estos respektataj. Per tiu Deklaracio Laoso fariĝis neŭtraligita ŝtato same kiel Aŭstrio en 1955.

Troviĝas specialistoj pri internacia juro, kiuj opinias, ke unuflanka deklaro pri konstanta neŭtraleco, distinge de neŭtraligo, ne havas per si mem efikon laŭ internacia juro. Tiu opinio ne ŝajnas ĝusta. Deklaro pri konstanta neŭtraleco, se ĝi estas entenata en konstitucia akto aŭ en alia jura dokumento, en ĉiu okazo estas jure valida laŭ la interna juro de la koncerna ŝtato. Tia deklaro neniel kontraŭas kiun ajn regulon de internacia juro. Eĉ pli, ĝi estas konforma al suvereneco kiel unu el la fundamentaj principoj de la nuntempa internacia juro. Ĝi estas ankaŭ konforma al la sistemo de kolektiva sekureco jure difinita en la Charto de UN. Tial, deklaro pri konstanta neŭtraleco devas esti rigardata kiel jure deviga ne sole laŭ la interna juro de la koncerna ŝtato, sed ankaŭ laŭ internacia juro.

Kompreneble, el vidpunkto de internacia juro eĉ pli forta estas *neŭtraligo*, t.e. konstanta neŭtraleco garantiita de la grandaj potencoj kaj de aliaj ŝtatoj. Ĝi sendube estas institucio de internacia juro. Tial, kia ajn malrespekto de la reguloj pri neŭtraligo ĉu fare de neŭtraligita ŝtato, ĉu fare de la garantiantoj kaj, tre verŝajne, ankaŭ fare de aliaj ŝtatoj, signifas malobservon de la koncernaj reguloj de internacia juro aldone al eventuala malobservo de pliaj principoj kaj normoj de tiu jura branĉo.

### *Konkludo*

El ĉio dirita almenaŭ la jenaj tri gravaj konkludoj povas esti faritaj:

(1) Neŭtraleco kaj neŭtraligo en la klarigitaj sencoj plu estas rekonitaj en la nuntempaj interŝtataj rilatoj kaj ankoraŭ kaŭzas difinitajn internacjurajn sekvojn, kvankam la aktuala valoro de tiuj institucioj konsiderinde ŝanĝiĝis kompare kun la signifo, kiun ili havis en la 19-a jarcento. Dum en la pasinta jarcento kaj komence de la 20-a ĝis 1914 oni fidis, ke neŭtraleco kaj neŭtraligo estos respektataj, la sperto de la du lastaj mondmilitoj montris, ke ili ne donas efikan protekton kontraŭ agreson, se la malobservo helpas la militajn celojn de la agresanto. Eĉ pli krudajn kaj pli ĝeneralajn malobservojn oni povas atendi fare de la agresita flanko en kazo de plia universala, totaleca milito.

(2) El vidpunkto de la mondaj paco kaj sekureco, la neŭtralecon kaj neŭtraligon oni neniel povas juĝi abstrakte, sed nur konkrete, prenante en konsideron la faktan politikan situacion. Ekzemple, la konstanta neŭtraleco kaj neŭtraligo de Svislando montriĝis utila eĉ dum la du grandaj mondmilitoj ankaŭ tial, ĉar ĝuste la fakta kaj internacjura pozicio de tiu ŝtato ebligis kontaktojn inter la militantaj partioj. Same pozitiva, almenaŭ en tempo de paco, estas la kreo de neŭtraligitaj buŝŝtatoj inter la grandpotencaj blokoj, kiel en la kazo de Aŭstrio. Aliflanke, politiko de neŭtraleco aŭ deklaro de konstanta neŭtraleco en situacio evidente kondukanta al universala milito estas fakte nur kuraĝiga por la agresaj fortoj, do negativaj el vidpunkto de la mondaj paco kaj sekureco. Se neŭtraligita ŝtato pro siaj juraj obligacioj ne rajtas ŝanĝi sian pozicion dum ĝi mem restas neatakita, la neŭtralaj aŭ neengaĝitaj landoj povus kaj devus decidiĝi, ankaŭ en sia propra intereso, favore al la potencialaj aŭ eĉ aktualaj viktimoj de agresio. Tio povus savi la pacon aŭ, se ĝi jam estas rompita, kontribui al pli rapida ĉesigo de la milito. En ĉiu okazo, neŭtraleco estas neniel pravigebla en serioze minacaj konfliktaĵaj situacioj inter la agresantoj kaj iliaj viktimoj, inter la atakantoj kaj sindefendantoj, inter la progresaj fortoj de demokratio kaj la sklavigaj de totalismo. Tio, cetere, estas tute konforma ne nur al la Charto de UN, sed ankaŭ al la respektivaj normoj de la nuntempa internacia juro kaj al la bazaj principoj de internacia moralo, kiuj devas aplikiĝi, se la sekureca sistemo de UN kolapsas.

(3) Se ŝtato deziras konduki politikon de neŭtralecon, ĝi mem decidus pri la sfero, amplekso, grado kaj formo de sia neŭtraleco. Tia ŝtato, same kiel neŭtraligita ŝtato, rajtas kaj devas utiligi ĉiujn permesitajn rimedojn, inkluzive kiel eble plej fortan armeon, por protekti sian neŭtralecon en tempo de paco kaj por sin defendi en kazo de milito. Neŭtraleco ne signifas, nek iam signifis, rezignacian pasivecon rilate la proprajn interesojn, ankoraŭ malpli rezignon pri sindefendo.

### *Aplikeblo al UEA*

Kvankam UEA, same kiel similaj kulturaj societoj, ne estas ŝtato, sed neregistara organizaĵo, tamen al ĝi estas aplikeblaj — ne blinde, sed adekvate — la supraj instruaj konkludoj, precipe tiuj entenataj en (2) kaj (3) rilatantaj al la sfero kaj karaktero de neŭtraleco, kiel ankaŭ al la rajto kaj devo protekti sian propran koncepton de neŭtraleco kaj defendi ĝin kontraŭ atakojn. Antaŭ tre longe mi nomis tion aktiva neŭtraleco distinge de la senprincipe, pasiva kaj indiferenta neŭtralismo. En la kazo de UEA tia neŭtraleco estas kristale klare difinita en art. 4 kaj 13 de ĝia Statuto. Laŭ tiuj reguloj UEA devus esti neŭtrala rilate partipolitikon, naciecon, rason, religion kaj sociajn demandojn, sed certe ne rilate la lingvan problemon en internaciaj rilatoj, nek rilate la esencajn kondiĉojn, kiuj influas favore aŭ malfavore la rolon de Esperanto kiel instrumento de internacia komunikado. Tial la neŭtraleco de UEA estas determinita ankaŭ per la principo, ke la respekto de la Homaj Rajtoj kaj fundamentaj liberecoj estas esenca kondiĉo

por ĝia laboro, kaj per la deklaro, ke ĝi simpatie rilatas al ĉiuj movadoj kun identaj aŭ similaj celoj (art. 4/2 de la Statuto).

Observante la tiel difinitan neŭtralecon, kiu plene respondas al la neŭtrale homa karaktero de la Internacia Lingvo<sup>1</sup>, UEA restis fidela al si mem ekde sia fondiĝo en 1908 ĝis la mezo de 1974. Ĝi sukcesis atingi internan forton, vastigi siajn agadojn, progresigi la lingvon, akiri prestiĝon por si kaj respekton por Esperanto en la kultura mondo<sup>2</sup>.

Ekde la hamburga Universala Kongreso de Esperanto en 1974 la Neŭtrala Esperanto-Movado, fidela al la tradicia zamenhafa esperantismo, transprenis la taskon flegi, defendi kaj progresigi la tiel difinitan neŭtralecon, kiu la posthamburgaj gvidantaroj de UEA krude malobservis kaj plu komplete ignoras<sup>3</sup>.

Prof. D-ro Ivo Lapenna

Aldonaj komentaj notoj

<sup>1</sup> En ligo kun niaj artikoloj en *Horizonto* kaj ĝenerale kun la diskuto pri la statutprojekto de UEA, tre multaj legantoj plene aprobis nian analizon, sed troviĝis ankaŭ kelkaj sinceraj esperantistoj, kiuj iom senespere skribis, ke «ne ekzistas absoluta neŭtraleco» aŭ «abstrakta neŭtraleco», k.s. Kompreneble, tiuj rimarkoj estas ĝustaj, sed pri tio tute ne temas. Ĉiam temas kaj plu temas pri *konkreta* neŭtraleco, kiun diktas kaj kies enhavon determinas konkretaj cirkonstancoj kaj interesoj. La *konkretan formon* de la neŭtraleco de UEA, kiel difinitan en art. 4 kaj 13 de ĝia Statuto, diktas la neŭtrale homa karaktero de Esperanto, kiel detale analizite en ĉap. 18.2.1 de *Esperanto en Perspektivo* (p-oj 553-561) kaj aliloke en tiu verko. Ĝin diktas ankaŭ la aktualaj kaj perspektivaj interesoj de Esperanto super ĉiuj provizoraj, dumtempaj aŭ eĉ momentaj politikaj fluktuadoj en unuopaj landoj aŭ en interŝtataj rilatoj. Superflue diri, ke ankaŭ tia aktiva neŭtraleco estas «politiko», sed ĝi estas *propra politiko de neŭtraleco*, konforma al la karaktero kaj rolo de Esperanto, al la celoj kaj tradiciaj idealoj de la Esperanto-Movado. Ĝi certe ne estas politiko de konscia aŭ rezignacia submeĝo al *partipolitikaj* ekstermovadaj fortoj, kies sola celo estas senreziste propagandadi siajn partipolitikajn doktrinojn kaj interesojn en la *sino de UEA*, misuzante la Asocion kiel «transmisian rimeno».

<sup>2</sup> Pri la atingoj de UEA en la periodo finiĝinta en julio 1974 v. ĉap. 18 de *Esperanto en Perspektivo* (p-oj 548-634). Resuma tabelo trarigardo troviĝas sur p. 632. Oni komparu tiujn dokumentitajn faktojn kun la malprogreso sur ĉiuj linioj ekde Hamburgo ĝis la nuna momento. Kaj oni iom pripensu la kaŭzojn.

<sup>3</sup> La veraj kaŭzoj de la hamburgaj eventoj estas prezentitaj kaj detale analizitaj en la verko *Hamburgo en Retrospektivo*. La posta evoluo konfirmis la analizojn. La politikigo de UEA kaj la komplete aŭ parta ĉesigo de preskaŭ ĉiuj antaŭaj agadoj, kiuj siatempe rezultigis progresojn en ĉiuj direktoj, speguliĝis ankaŭ en la fakto, ke UEA perdis unu kvinonon de la kerna, individua membraro. La forigo de la esencaj reguloj rilate neŭtralecon el la statutprojekto de UEA, fakte signifas ankaŭ formalan konfirmon de neneŭtraleca praktiko ekde Hamburgo, kiel jam analizite sur la paĝoj de *Horizonto* kaj aliloke. Se tiuj reguloj estos definitive forigitaj en la nova Statuto de UEA, UEA ĉesos ankaŭ formale esti partipolitike neŭtrala organizaĵo, kio siavice perdigos al ĝi pliajn multajn membrojn kaj eĉ minacos ĝian ekziston. Proksimiĝas la centjara datreveno de Esperanto. Estas la lasta momento, ke la tuta esperantistaro, precipe la membraro de UEA, vekigu kaj ekagu. Anstataŭ silente permesi, ke per la akcepto de la statutprojekto en la nuna formo la Esperanto-Movado plu rompiĝu kaj malintegriĝu, ĝi energie postulu la konservon kaj observon de la reguloj pri neŭtraleco en la nuna Statuto de UEA. Nur tio povas reunueciĝi la disrompitan Asocion, tiel ke ĝi povu digne kaj prestiĝe memori kaj eble eĉ celebri la datrevenon.

I. L.

## PORTURISTAJ KOMPUTEROJ

El Nov-Jorko la franclingva gazetagestejo (AFP) komunikas, ke «LEXICON», ia malgranda vortaro-komputero por la poŝo, estas vendata en Usono.

Por komprenigi sin tra la tuta mondo sufiĉus tajpi la bezonatan vorton sur klavaro! Dank'al memor-kaseto ne pli dika ol alumet-skatolo la aparato donus sur ekrano la parolon! Sed oni ne precizigas, ĉu la ekrano krome prononcas ĝin!

Ĝis nun kvin kasetoj estas disponeblaj: angla-franca, angla-germana, angla-itala, angla-hispana kaj angla-portugala. La inventinto — greko elmigranta en Usonon en 1961, s-ro Anastasios Kyriakides, eltrovis bonan rimedon de enspezo, ĉar la aparato estas vendata 225 dolarojn (aŭ ĉ. 1.000 FF) kaj ĉiu kaseto 65 dolarojn (aŭ ĉ. 300 FF). Kaj li jam anoncas pliajn lingvojn, la rusan, svedan, polan, grekan, japanan kaj ĉinan.

Sed la kliento riskas trafi strangan aventuron per sia «portebla Babelo». Espereble la greka lingvo estos pli bone traktita ol la franca, ĉar oni rajtas miri pri la jenaj ekvivalentoj: «noisy», brua, iĝas «tapageux» anstataŭ «tapageur», kiu cetere signifas: tulumta aŭ skandale bruega; «physician», kuracisto, iĝas «médecine» (medikamento); «what time is it?», kioma horo estas? laŭvorte tradukiĝas «kio tempo estas?» kaj «ou est le métro?»<sup>1</sup> transformiĝas en «either east the subway?» (aŭ oriente la subtera trajno?); fine, «collect call» (appel téléphonique en PCV) metamorfoziĝas en «appel charges renversées» laŭ la franca Kebeka paŭsaĵo el la angla!

Kaj tamen granda magazeno en Nov-Jorko sukcesas vendadi ĝin po kvin tage meznombre. Eĉ nova konkurenca aparato<sup>2</sup> estas jam anoncita: kompreneble pri tiaj aferoj forĝu feron, dum ĝi estas varmega!

<sup>1</sup> «Kie estas la metro-stacio?»

<sup>2</sup> «Graig translator.»

Jean Thierry

## ANDERO CSEH

La 9-an de marto 1979, je la 83-jara aĝo mortis en Scheveningen, Nederlando, aktiva pioniro de Esperanto, P. Andreo Cseh, aŭtoro de tre interesa instrumentado.

Longa kaj efika estis la aktivado de nia samideano. Lia instrumentado famiĝas, kaj pluraj esperantistoj uzas lian metodon por instrui la Internacian Lingvon.

Omage al tiu sindona kaj elstara figuro en la Esperanto-mondo, ni transkribas artikolon aperintan en «Espero Katolika», n-ro 5/1978, honore al li.

## GOJIGA HONORADO DE LA GRANDA ESPERANTO-PIONIRO

ANDREO CSEH

(«El Universala Ligo» 1/1978)

Verŝajne ne ĉiuj scias, ke Andreo Cseh funkciis kiel katolika pastro, kiam li komencis sian rondvojaĝon tra Eŭropo por instrui Esperanton laŭ rekta metodo, kiun li mem kreis kaj ellaboris, la t.n. «Cseh-metodo».

Cseh fariĝis pastro en la jaro 1919, kaj pastre li agadis dum mallonga tempo en kelkaj urboj de sia hejmlando Transsilvanio, nun provinco de Rumanujo. Li dediĉis, dum sia pastra laboro, ĉiam pli da tempo al la instruado de Esperanto. Lia episkopo, grafo Majláth, vidante la grandan entuziasmon de Cseh por Esperanto, donis al li en 1924 libertempon, por ke li povu dediĉi sin tute al la disvastigo kaj instruado de Esperanto.

En la fino de la jaro 1929-a, post vojaĝoj por instrui kaj propagandi Esperanton en multaj landoj de Eŭropo, Cseh, pastro de la diocezo Transsilvanio en Rumanujo, vojaĝis kun permeso de sia episkopo al Nederlando por tie labori kiel Esperanto-instruisto favore al la tiam tre forte sentata idealo: mondpaco per unu mondlingvo. Kune kun gesinjoroj Isbrücker li fondis en Hago la Internacian Cseh-Instituton. Kun granda sukceso li gvidis Esperanto-kursojn por ĉiaspecaj grupoj de homoj, ne sciante, ke la tiam episkopo de Harlemono, Monsinjoro J.D.J. Aengenent, en kies diocezo situis tiutempe ankaŭ la urbo Hago, malpermesis al siaj pastroj — pro la danĝero de t.n. miksaj geedziĝoj — doni lecionojn al katolikoj kaj protestantoj kune. Pro tio, ke Cseh laboris alie ol la pastroj de la diocezo Harlemono, Ms-ro Aengenent uzis eklezian rajton kaj malpermesis al Cseh la restadon en la diocezo Harlemono. Cseh ne povis obei tiun ordonon, kaj apenaŭ komprenis la aferon, ĉar li estis malhelpata de manko de sufiĉa scio pri la nederlanda lingvo; tial li decidis tamen daŭrigi laŭ sia kutima maniero siajn Esperanto-kursojn, kaj post iom da tempo Ms-ro Aengenent forprenis de Cseh la rajton de pastra servo.

En la Ripozejo por Altaĝuloj «Huize Royal», kie Cseh loĝas nuntempe, vizitis lin la estro de la paroĥo, ĉefpastro Genemans, kiu interesiĝis pri liaj travivaĵoj. Li decidis fari klopodojn por atingi, ke Cseh reakiru la pastrajn rajtojn. La sekvoj de tiuj klopodoj estis, ke Cseh ricevis la 6-an de januaro 1978 kortuŝan leteron de Ms-ro Zwartkruis, la nuna episkopo de Harlemono, kiu enhavas informon, ke Cseh rehavas nun siajn pastrajn rajtojn. Kopioj de tiu letero estas senditaj al la episkopo de Roterdamo, Ms-ro D-ro Simonis, kaj al nuna episkopo de Transsilvanio. Ĉi-poste sekvas esperantlingva traduko de tiu letero.

La paroĥo S. Antonio Abato, kies ano estas Pastro Cseh, festis dimanĉon, la 15-an de januaro 1978-a, sian oran jubileon, je kiu okazo la Episkopo, Ms-ro Simonis, kuncelebris Sanktan Meson, kun ses pastroj. Laŭ propono de ĉefpastro Genemans, unu el la kuncelebrantaj pastroj estis Pastro Andreo Cseh. Per tio oni alte honoris Pastron Cseh. Kompreneble tio estis por li kaŭzo de granda ĝojo.

La ĉefpastro informis la ĉeestantajn kredantojn, ke unu el la kuncelebrantaj pastroj estas lia Pastra Moŝto Andreo Cseh, kiu post 43 jaroj de vivo sen pastraj rajtoj, estas rerajtigita kaj nun honorata pere de kuncelebrado de Sankta Meso, celebrata de Lia Episkopa Moŝto D-ro Simonis. La ĉeestantoj esprimis sian ĝojon per forta aplaŭdo.

La tuta esperantistaro certe ankaŭ ĝojas pri la ĉi supre priskribita okazintaĵo, tiel ĝojiga kaj honoriga por la granda pioniro de Esperanto, Andreo Cseh.

Pastro Andreo Cseh: Pace ripozu!

## PROTESTOJ TRA LA FRANCA GAZETARO

El MATCH n.º 1551 (16/2/79): La leĝo de la 31-a de decembro 1975 altrudas la uzadon de la franca lingvo en «*la priskribo, oferto, prezento, skriba aŭ parola reklamado, uz-indikoj aŭ instrukcioj, garanti-kondicoj de varo aŭ servo same kiel en la fakturoj*». Bedaŭrinde kiam temas pri importitaj produktoj la traduk-kvalito lasas multon dezirotan, igante ofte nekompreneblaj uz-indikojn kaj etiketadojn. Tiel laŭvorta traduko povas alveni al teksto perfekte malklara, kiel tiuj «*instrukcioj por ŝveli*» donatajn al aĉetantoj de futbala pilko fabrikita en Indio. Oni indikas: «*Kiel ŝveli? La sekvantaj direktoroj certigos la ne-fluadon de la aero kaj tenos la veziketon por krevi. Etendu la skatolon per pilko en sian formon propran kaj rondan kaj skuu ĝin por eviti la faldadon de la veziketo. Plongigu la ŝvelilon kun akvo antaŭ la ŝvelado eku. Tenu la nazon per la fingroj kaj enŝovu bone en tien la ŝvelilon. Tenu la ŝvelilon vertikale en la nazo sen direkto zigzaga*»<sup>1</sup>.

Estas vero, ke la franca teksto estas traduko de germana teksto, siavice tradukita el la angla! Sed tiu ekstrema ekzemplo montras ja la gravecon... de la lingvistiko en la informado de la konsumanto!

El LE MONDE (22/3/79): prof. Hugues Gounelle de Pontanel de la Nacia Akademio de Medicino protestas: «*Cu estas tolereble, ke scienca kongreso organizita en Francio de francaj universitatoj postulas la ekskluzivan uzadon de la angla lingvo, tiel vole forigante la francan?*

*Tia tamen estas la decido de agregacia profesoro Solassol kaj d-ro Joyeux el la instru-fako pri nutrado kaj metabolismo de la anti-kancera centro de la Montpellier-a Universitato. Efektive por la kvara semajno pri artefarita nutrado organizita en venonta junio estas antaŭvidite: «Ĉiuj kursoj estos faritaj en la angla sen samtempa tradukado»...*

*Ke la franca lingvo troviĝas tiel forpelita en nia lando, jen kulmino! Kiel defendi nian kulturalan komunan havon, kiam tiuj mem, komisiitaj fruktigi ĝin, tiel agas?*

*Kion povas pensi la fremduloj francaparolantaj aŭ familiaraj je nia lingvo pri tia rezigno kaj spirito de abdiko.*

*Ni estas multaj profunde konsternitaj!*<sup>2</sup>

Jean Thierry

<sup>1</sup> «Comment enfler? Les directions suivantes assureront le non coulage du air et maintiendront la vésicule de crever. Tendez la caisse à balle en sa forme propre et rond, et secouez-la pour éviter le pliage de la vésicule. Plongez l'enfleur avec l'eau avant l'enflure commence. Tenez le nez avec les doigts et insérez bien en y l'enfleur. Tenez l'enfleur verticalement dans le nez sans direction zigzag.»

<sup>2</sup> Cirkulero de la 30-a de decembro 1976 pri «*la uzo de la franca lingvo en la publika servo de instruado kaj esplorado*» memorigas la 2-an artikolon de la leĝo de la 18-a de marto 1880, laŭ kiu «*nenia fremda lingvo povas esti fakte trudita kiel atiro-rimedo al iu ajn el tiuj servoj!*»

## MEDITIGA INFORMO

En «Perspektivo» —majo 1979—, aperas jena frontartikolo:

ĈU ENTUTE EBLAS, POST HAMBURGO 1974, OKAZIGI INDAN U.K. EN ORIENTEŬROPA LANDO?

Groteska farso dum la universala, tiel nomata neŭtrala mondokongreso en Varna

NOVA SENTO, organo de la itala esperantista junularo, petis nin publikigi la sekvantan artikolon:

«Antaŭ nelonge atingis la poŝtfakon de IEJ detala raporto pri ĉagrenaj misaĵoj okazintaj al du samideanoj dum la ĉijara UK en Varno. Kiel nova redaktoro de tiu ĉi angulo, kaj konforme al la decidoj de la lasta IEJ-estrarkunveno, mi proponas ĝin al vi ĉisube por estonta medito.

Mauro Nervi

### LA POLICA AGADO EN VARNO

Unue ni tuj klarigu, ke ne temas ĉi tie pri enmiksiĝo en la internajn aferojn de iu ajn lando, specife de Bulgarujo. Ni tute ne volas forgesi la neŭtralecon enkadre de kiu agadas UEA kaj TEJO, sed ni ankaŭ ne volas forgesi la gravan atencan kontraŭ la fundamentaj homaj rajtoj, kiu okazis enkadre de la 63<sup>a</sup> Universala Kongreso de Esperanto aŭ, pli detale, de la postkongreso de la 34-a IJK (Internacia Junulara Kongreso).

Due oni konstata, ke ni ne intencas protesti ĝenerale kontraŭ la kondiĉoj, sub kiuj okazis la 34-a IJK, nek kontraŭ iu aspekto de tiu ĉi kongreso. Ni prefere nur rakontu

ĝuste tion, kion ni mem spertis, kaj kion ni konsideras inda kaj sufiĉa, por ke la oficialaj instancoj de la Esperanta movado reagu energie.

Jen do la rakonto:

Johano Moretó i Reventós kaj Marteno Ruiz i Altaba (la unua estas B-komitatano de TEJO) estis invititaj kunvojaĝi per la jugoslava aŭtobuso post la kongreso en Veliko Tarnovo al Varno, kaj poste al Istanbulo kaj reen ĝis Zagrebo. Tiu ĉi invito estis de ni du feliĉe akceptita, kaj ni kunveturis sabaton la 29an de Tarnovo al Varno, kien ni alvenis proksimume je la dua posttagmeze. La aŭtobusado estis aranĝita de Internacia Kultura Servo (Zagrebo), kaj ĝin partoprenis junaj geesperantistoj el Kroatujo, inter kiuj troviĝis sufiĉe multaj infanoj. Kompreneble la tuta afero devis esti jam en ordo kaj la dormloko por la kvindekda aŭtobusanoj certigita jam antaŭ kelkaj monatoj.

Bedaŭrinde, la aferoj ne iris tiom glate, kiel estus supozinde, kaj dum la tuta posttagmezo ni daŭre serĉis iun ajn respondeculon, kiu povis klarigi, kie ni dormu, kial la antaŭrezervitaj lokoj estis donitaj al aliaj homoj. Mallonge, ke iu klarigu al ni, kial la organizado estis tiom fuŝa. La detalojn pri tiu ĉi vana serĉado oni prefere legu en la raporto de IKS, kiun vi verŝajne jam ricevis, solidarece kun tiu ĉi nia. Lacegaj pro la malsukceso ni ĉiuj vespermanĝis en restoracio, kaj poste iomete partoprenis la interkonan vesperon. Dume ni ricevis plurajn promesojn de LKKanoj, sed fakte la atendado kaj strebado de Judita Hudeček (jugoslava gvidantino) same vanis.

Ni miris, kiom multe da bulgaraj geesperantistoj estis tie. Mirinde estis, kiom multe da bulgaroj promenis en la kongresejo kun verda steleto kaj samideanaj mienoj. Malŝiĉe, preskaŭ ĉiuj estis komencantoj, kiuj balbutis eĉ ne unu vorton esperantlingvan. Kiel ni poste konstatis, tiuj ĉi homoj estis la delegacio de la bulgara polico en la kongreso (fakte, la konstato ne surprizis nin; en la TEJO-kongreso policianoj ankaŭ amase zorgis pri ni). Dum tiu mallonga restado en la kongresejo ni du profitis la okazon paroli kun la prezidanto de UEA, s-ro Tonkin, pri iuj aferoj rilatantaj la tradukon de sciencaj tekstoj. Ni tri, kune kun la jugoslavino Zdravka Metz, aperas en unu el la oficialaj fotoj de la UK. Tion ni nur citas kiel pruvo, ke ni ne estas «perfortistoj» aŭ «vandaloj» kiel nin nomis poste sufiĉe multaj bulgaroj.

Post la interkona vespero (proksimume je la 11a) ni enaŭtobusiĝis kaj, foje akompanataj de iaj respondeculoj, daŭre serĉis dormlokon. Fine ni tute ne trovis lokon, kaj ni devis dormi, ĉu en la aŭtobuso ĉu en parko. Ni atentigu pri la fakto, ke ni du ne tiom koleriĝis kiel la jugoslavoj, ĉar ili estis eĉ pagintaj antaŭ kelkaj monatoj. La afero estis entute tamen sufiĉe malagrabla, precipe pro la infanoj, kiuj akompanis nin.

Dimanĉe matene ni matenmanĝis en luksa hotelo en Varno kaj poste iris al la kongresejo por ĉeesti la oficialan malfermon, kio estis fakte unu el niaj celoj en Varno (aliaj celoj: daŭre partopreni la tiutagajn aranĝojn de la kongreso). Alvenonte tien ni decidis protesti pro tiu ĉi malbona organizado, ĉar ne nur ni, sed proksimume 700 aliaj homoj ne trovis dormlokon tiun nokton. Brila ideo pri kiel protesti aperis en ies kapo kaj estis jena: per dormsakoj montri senforte al la partoprenantaro, kio okazis.

Ni do prenis niajn dormsakojn (la jugoslava grupo kaj ni du) kaj eksidis sur ilin ĉe la scenejo de la kongresejo. Mankis nur kelkaj minutoj ĝis la komenco de la ceremonioj. Tuj subite venis amaso da respondeculoj, LKKanoj, gravaj homoj, kiuj la antaŭan tagon tute malestis. Kelkaj el ili certigis nin pri la fakto, ke jam ĉio estas aranĝita, kaj ni tuj havas lokon. Aliaj opiniis, ke la kulpo estas tute nia, ĉar ni ne kapablis trovi la ĉefan respondeculon. Ankoraŭ aliaj minacis nin, sed ili tion faris bulgarlingve. Rimarkindas, ke pluraj LKKanoj scipovis eĉ ne unu esperanto-vorton.

Ankoraŭ kelkaj ripetis al ni, ke tio ne estas inda por kongreso universala, kaj ke ni plu estas esperantistoj. Tio aparte mirigis nin, ĉar ŝajnas kvazaŭ ĉio alia estas inda por kongreso, kaj la Bulonja deklaro («esperantisto estas ĉiu, kiu scipovas kaj uzas la internacian lingvon») ne plu validas.

Fine, ĉar la afero ŝajnis feliĉe aranĝita, ni prenis niajn dormsakojn kaj foriris, same trankvile kiel ni envenis. La salono jam estis preskaŭ plenŝtopita de homoj, kaj restis nur sufiĉa loko por ni ĉiuj en la fono de la salono, loko kiu estis alirebla nur de la ekstera koridoro.

Kiam ni eliris la kongresejon kaj estis jam en la koridoro, la respondeculoj malaperis, kaj la promesoj ne plu estis. Anstataŭ la lokon ĵus certigitan oni diris al ni, ke ni havu paciencon kaj atendu ankoraŭ kelkajn horojn, verŝajne same vane. Ni tiam tuj rekuŝiĝis sur niajn dormsakojn, kaj post deko da minutoj ŝajnis, ke fine la tuta situacio estas aranĝita. La detalojn de tiu ĉi aranĝo ni neniam konis, ĉar ĝi tute fuŝiĝis. Ni restis sidkuŝantaj ankoraŭ kelkajn minutojn, atendante, ke Judita certigu al ni, ke la afero estas jam en ordo.

Dume multaj homoj venis al ni kaj demandis pri la situacio, pri kio okazis, kaj tiel plu. Persone ni babiladis kun la itala TEJO-komitatano Roberto Tresoldi kaj kelkaj francoj partoprenintaj la IJKon. Ŝajnis, ke la malagrablaĵoj jam pasis, kaj ni ĉiuj repakis niajn dormsakojn kaj ekstaris.

En la salono subite tondris la himno de la Esperanto-movado, kaj ni ĉiuj decidis eniri. Ni devis supreniri ŝtuparon ĝis tie, kie estis libera loko. Pensante, ke tiu ĉi prome-

nado sufiĉe vanis, kaj ke apud ni estis pordego por eniri la salonon, ni preferis eniri tuj kaj ne havi sidlokon. Tiam Marteno Ruiz i Altaba ekmarŝis rekte al la pordo por eniri. Forta bato malebligis al li tion. Li turniĝis kaj rimarkis bulgaran esperantiston, bele garnitan per stelo kaj aliaj kongresaj ornamaĵoj, kiu, diable!, lin alparolis bulgare. Tamen ŝajnis pli interesa la Oficiala Malfermo, kaj Marteno turniĝis kaj daŭrigis sian vojon al la pordo. Sed tuj antaŭ ĝi lokiĝis tiu sama «samideano» kaj, kvazaŭ frenezulo, kriegis Pro evidentaj malfacilaĵoj eniri, Marteno haltis kaj, ne havante tempon por demandi lin, kion li volas, ricevis novan baton sur la kapon.

La situacio tiam rapide ŝanĝiĝis. Marteno respondis al la bulgaro en la sama maniero. Tuj alvenis aliaj samideanoj bulgaraj, kiuj ekbatadis lin, kaj la apudstaranta Johano Moretó i Reventós klopodis ĉesigi tiun stultegan bataleton.

Ni rimarkigu la fakton, ke dufoje perforte agis tiu policisto (tio li estis) antaŭ ol li ricevis perfortan respondon. Ni klarigu, ke la intencoj de Johano tute ne estis frapi bulgariajn policistojn, sed malebligi al ili tion fari al Marteno. Ni ankaŭ klarigu, ke ĉiuj tiuj policanoj ne nur estis vestitaj kvazaŭ ordinaraj homoj, sed ke ili volis ŝajni esti esperantistoj. Neniu el ili komprenis eĉ unu vorton esperantan.

Amaso da policistoj falis sur nin du, kaj perforta, absurdega batalo komenciĝis kaj tui ĉesis. Trideko aŭ kvardeko da policistoj lerte bategis nin kaj trenis nin eksteren tra iu flanka pordo, daŭre frapante nin, precipe sur kapon kaj ventron. Ni du tiam ege klopodis malpermesi tion, ĉar evidente ekster la kongresejo, kaptitaj de tiom stultaj policistoj, niaj rajtoj nuligiĝis, kaj ni ne plu povos komuniki kun iu ajn konata. Niaj klopodoj estis tute vanaj, ĉar ekstere eble kvindeko da policistoj atendis nin, kelkaj el ili armitaj, kaj ili enirigis nin en policajn aŭtomobilojn, ni du en apartan aŭtomobilon, garditaj de kvar tiaj policanoj.

Sekvis rapidega veturado tra Varno, helpita de sirenoj kaj lumkamoj. En la aŭtomobiloj, nur por esti certaj, ke ni ne klopodos fuĝi, ili daŭre frapis nin, precipe per kubutoj en la ventron. Neniu el tiuj ĉi homoj scipovis la esperanton lingvon.

Dume, kaj tion ni diras dank'al tio, kion oni poste rakontis al ni, ŝajnas, ke iu polino histerie kriadis, vidante la batalon, kaj ke granda policanaro ĉirkaŭis la jugoslavan grupon kaj minace enirigis ilin en apartan ĉambbron, kie oni petis ilin, ke ili tuj foriru per sia aŭtobuso. Feliĉe por ni du tamen ili tion ne akceptis, se ni ne akompanus ilin. Ankaŭ feliĉe (ĉu estis io feliĉa en tiu perforta agado de la bulgara povo?) kelkaj el la jugoslava grupo malpermesis al kelkaj aliaj eniri la batalon. Feliĉe, ĉar plimulte temis pri infanoj kaj junulinoj. Policanoj ne estus vidintaj tion, supozeble.

Ni du estis dume en la aŭtomobiloj, kaj post iom da tempo ili haltis ĉe policejo. En la aŭtomobiloj ili manŝekligis Johanon, kaj tuj post eliro el la aŭtomobilo ili manŝekligis ankaŭ Martenon. Ni du tute ne povis forkuri, nek rezisti. Neniu el ili parolis Esperanton, kaj ni du uzis eĉ inter ni nur tiun lingvon, certaj pri tio, ke ili ne komprenis nin.

Ni tuj reagis kaj petis, ke oni informu niajn ambasadorejojn aŭ konsulejojn. Tion ili ja komprenis, sed ili priridis nin. Ni estis fermitaj en apartaj ĉambretoj. Ili mezuris proksimume unu kvadratmetron kaj ne havis fenestrojn. Marteno estis enkatnigita al iuj feraj tuboj ĉe la muro. Menciindas, ke ili daŭre minacis nin — bulgarlingve. Ili serĉis, kion ni havas en niaj poŝoj, kaj ili tiel trovis la pasporton de Johano — hispanan pasporton. Marteno ne kunhavis la sian.

Post eble nur tridek minutoj aperis en la policejo la ununura homo, kiu scipovis Esperanton. Neniu pri Dimitrov, ano de la Tarnova LKK, kiu ĉion vidis en la kongresejo. Ni du rememoras ankaŭ laŭ la nomoj Jordanov («Danĉo») kaj Papazov. Sed estis tie pluraj aliaj IJK-LKKanoj kaj multe da maljunuloj, membroj de la Varna LKK. Unue ni pensis, ke ni jam estis savitaj, kaj ke ni baldaŭ forlasos tiun malliberejon. Nia espero iĝis koleri, kiam ni ekvidis, ke tiu Dimitrov tute ne helpis nin, sed li minacis nin («se vi ne subskribas kelkajn paperojn, vi restos ĉi tie eble tri monatojn») kaj entute malhelpis.

Estas interese, ke la policanoj obeis al tiu Dimitrov. Kiam li jam estis tie eble unu horon, oni trenis Johanon en apartan ĉambbron, kie troviĝis multaj uloj, kelkaj el ili ŝus venintaj, kaj daŭre minacis lin. Li respondis petante, ke oni avertu la hispanan aŭ la meksikan konsulojn, sed ili tion ne faris. Neniu el ni du subskribis ion ajn. Oni revenigis Johanon en la ĉelon, kaj ni atendis en niaj ĉeloj dum unu horo aŭ eĉ pli.

Finfine, oni malŝekligis nin kaj kondukis nin eksteren. Tie oni volis veturigi nin al «ie, kie viaj geamikoj jugoslavaj atendas vin». Ni tion rifuzis kaj volis iri piede, sed por ili tio estis granda ĝenaĵo (iu povus vidi nin). Ni tiam akceptis eniri aŭtomobilon, sed kune kaj akompanataj de Dimitrov.

Oni kondukis nin al la Universitato de Varno, kie nin atendis ĉiuj jugoslavo, kaj krome Papazov, Jordanov kaj pluraj aliaj gravuloj. Ankaŭ estis tie du niaj samlandanoj (t.e. katalunoj). Nia aspekto estis ege malbona. Okulo de Johano tute nigris, same

kiel brako de Marteno. Niaj ĉemizoj estis disŝiritaj kaj sen butonoj, kaj videblis sur niaj pojnjoj la markoj de la manŝekloj.

Kvankam malgrava interesas eble la fakto, ke tie ni du petis la telefonnumeron de niaj konsulejoj (aŭ de la Sofiaj ambasadorejoj), sed ili eĉ malpermesis al nia samlandano Jozefo Serrano serĉi ĝin. Ni ankoraŭ atendis tie dum duonhora, ĉar subite la organizintoj ĉion akceptis, kondiĉe ke ni forru el Bulgarujo. Oni redonis al la jugoslavo la pagitan monon kaj eĉ donis al ili «oficialan» kvitancon, kvazaŭ ili estus ŝanĝintaj tiun monon en oficiala monŝanĝejo.

Ni tiam pli detale rigardis ĉirkaŭ ni kaj vidis, ke nin gardis ankoraŭ amaso da policistoj, sed neniu uniformita. Verŝajne ek de nia eniro en Bulgarujo ni estis same garditaj. Verŝajne la policistoj uniformita, kiu staris antaŭ la loĝejo en Tarnovo estis ridinda procento de la policianaro, kiu «protektis» nin.

Poste ni enaŭtobusigis kaj akompanataj de Jordanov veturis ĝis la suda landlimo, rekte al Istanbulo. Dum la tuta vojaĝo veturis antaŭ ni polica aŭtomobilo, kiu haltigis ĉiujn veturilojn sur la landvojo, por ke ni pli facile kaj pli rapide foriru. La rolo de Jordanov estis, krom gardisto, plifaciligi la aferojn ĉie, kie ni haltis. Tiel ni ekmanĝis en restoracio apudvoja post nur dekkvinminuta atendado, kaj niaj lokoj en la motelo apud la landlimo estis certigitaj rekte el Varno de la LKK, kiu nun ja funkciis. Policistoj mem reveturigis Jordanov norden, sed antaŭ ol foriri li petis de ni du atestilon skriban, ke li bone plenumis sian taskon.

Ni turnas nin al la altaj instancoj de la Esperanto-movado por energie protesti kontraŭ tiu ĉi agado perforta. Ni akuzas la LKKon de Varno, kaj ankaŭ tiun de Tarnovo, pri senrespondeco rilate al la policaj fortoj, kiuj ĉestis la kongreson. Ne temas pri akuzo al la bulgara polico — verŝajne tio estis ĝia devo, ĝia rutino. Laŭ la meksika ambasadorejo en Sofio ni eĉ bonŝancis, ĉar oni ne ŝtelis de ni, ekzemple, la fotilon, kiun ni havis.

Ni nur esperas, ke oni sufiĉe disvastigu tiun ĉi rakonton, por ke ĉiuj esperantistoj konu ĝin, kaj por ke tiaj okazaĵoj neniam ripetiĝu.

Barcelono, la 24an de septembro 1978.

*Marteno Ruíz i Altaba  
Johano Moretó i Reventós*

Nun:

## **MIA KOMENTO KAJ PROTESTO**

Kun sincera bedaŭro kaj ĉagreno mi informiĝis pri la priskribita perforta agado, de la «esperantistoj» deĵorantaj en la Kongresejo en Varna (Bulgarujo).

En la unua momento mi intencis komenti la okazaĵon, sed la rakonto estas tiel klare kaj bone verkita, ke aldona komento estas superflua.

La Redakcio de «Perspektivo» je la fino de sia «Postnoto» diras:

«La supra artikolo atestas pri la fakto, ofte ripetita, ke UEA ekde Hamburgo 1974 lasas sin regi de sovetismo. Necesas nun centoj da policianoj por kontroli, ĉu UEA devias de la sovetisma linio. Tiu fakto estas, krom pensiga, ege ŝoka! Ke la revuo «Esperanto» nenion skribas pri tiuj eventoj ne povas mirigi.»

Jes, ili pravas rilate la organon de la Universala Esperanto-Asocio, sed mi, kiel denaska kaj samtempe veterana-jubilea hispana esperantistino, redaktoro ĝis la fino de la jaro 1975-a de BOLETIN, la organo de la Hispana Esperanto-Federacio, miras, miras pri la sinteno de la nuna ĉefredaktoro de nia organo, kiu ankaŭ silentas, kaj anstataŭ objekte informi, prezentas nur raporton pri la GRANDIOZA 63-a UNIVERSALA KONGRESO EN VARNA (BULGARIO). — Ĉu ankaŭ BOLETIN devas informi ordonate de la cenzuristoj de UEA?

Do, mi prezentas mian proteston pro la okazaĵoj en Varna, al la «altaj instancoj» de la Esperanto-movado, nome, antaŭ la Estraro kaj Komitato de la Universala Esperanto-Asocio (UEA). Kaj, kiel hispana esperantisto al la Estraro de la Hispana Esperanto-Federacio, kiu devas reprezenti ĉiujn hispanajn esperantistojn, kaj ne nur tiujn apartenantajn al difinita partieceo.

*Inés Gastón*

## IOM PRI LA KONFERENCA DISTRA PROGRAMO

# GREKUJO

Templo de Posidono  
sur promontoro Sunio




En Grekujo naskiĝis la arto kaj la scienco... la pensado kaj sentado de l' modernaj popoloj. La verkoj de ĝiaj poetoj, pentristoj, skulptistoj kaj arkitektoj estas ankoraŭ eternaj modeloj de artistoj.

La Atiko estas montara regiono kies klimato estas tepida, sendube pro ĝia duoninsula formo, kie abundas havenoj kaj golfetoj. En tiu belega regiono situas promontoro Sunio, kie elstaras la templo de la mara dio Posidono, kiun ni vizitos dum la konferenca semajno, same kiel ni ankaŭ vizitos la faman orakolejon Delfi.

Kaj kion ni diros pri la du artaj prezentadoj, «Greka Vespero» kaj «Atena Festivalo»? — Se en ĉiuj landoj estas interesaj tiuj elmontraj de populara arto, sendube en Grekujo tiu intereso multobliĝos, pro la multnombreco da tradicioj, kiuj speguliĝas en ili.

La V-a Konferenco en Ateno sin prezentas ja alloga. Krom la intereso de la labora-kultura programo, ni havos okazon koni landon de unika beleco, kaj ĝui agrablajn restadon kun distra programo.



Delfi: Templo de Apolo

OMAGO AL Vicente ALEIXANDRE (Sevilla, 1898)

Nobel - Premiito, 1977

NE SUFIĈAS

Sed ne sufiĉas, ne, ne sufiĉas  
 nek la sunlumo nek ĝia tepida spirado.  
 Ne sufiĉas la obskura mister' de iu rigardo.  
 Apenaŭ sufiĉis, iun tagon, la brua fajro de l' arbaroj.  
 Mi sciis pri la maro. Sed, tio, ankaŭ ne sufiĉas.

Meze de l' vivo, rande, certe, de la steloj, mordaj  
 kaj ĉiam dolĉaj pro iliaj randoj trembrilaj,  
 mi spertis la lumiĝon de mia frunto.  
 Sed tio ne estis tristeco. Trista la mondo estas;  
 tamen, la senlima ĝojo invadanta la universon  
 regis ankaŭ dum la palaj tagoj.

Sed tio ne estis tristeco. Tre lontanen mesaĝon  
 de iu nevidebla lumo moduladis lipoj,  
 aere, super duonbluaj ondoj  
 — ondoj de maro netuŝebla per miaj manoj.

Peza nubo, graveda, se eble, je penso stela,  
 ŝvebadis super akvosupraĵoj, migrante ĉirkaŭ la tero.  
 Eble ĝi estis ĉielsendaĵo de malproksimaj universoj,  
 kiun momento haltigas dum traĉiela irado.

Mi vidis kiel desegniĝis frunto

— dia frunto enprofundiĝinta en luman falton,  
 kiu trairadis temperon gravedan je penso sombra.  
 Per ĝi mi vidis zigzagi violkoloran fulmon; mi vidis okulojn  
 brili plenplenaj je senfina peza aflikto,  
 kaj mi vidis ke la nubo malproksimiĝis peze, obskure, fermite,  
 silente, al la enpensigema sunsubira krepusko senbaraja.

La alta ĉielo restis kvazaŭ malplena.  
 En la senvolva kavo mia krio eĥis  
 kaj perdiĝis samkiel mia penso kiu forflugis neniigante;  
 kiel plor' iranta supren, al la vakuo senkonsola, al senfundaĵo.

Kaj sur la grundon falis mia korppezaĵo. La ĉielo estis  
 nur konscienco mia, absoluta soleco.

Malprenecon pri Di' mi sentis sur la karno mia,  
 kaj neniam rigardante supren, mi enkavigis en la  
 sablon mian fronton

kaj mi nur kisis la teron — la obskuran, solan,  
 senesperan teron prenantan min.

Tiele, mi plorsingultis sur la mondo.  
 Ĉu, kiu pala lumo, kiu hanta malplenec' viglanta,  
 kiu forest' de Dio sur mia kapo disfalinta  
 gvatadis senmezure mian konvulsian korpon?  
 Ho, patrino, patrino, nur inter viaj brakoj mi konscias  
 pri mia propra mizer'. Nur sur la brusto via martirigita  
 de mi pro plorado,

mi oferdonas mian korp-volumenon. Nur en vi mi min neniigas

Tiuj limoj kiuj min premas

— tiu argilo kiu el la maro iam naskiĝis  
 kaj poste restis tie, en la plaĝoj viaj,  
 filino via, verko via, lumo via —  
 al vi petas, estingiĝinte, sian gloran konfuziĝon;  
 ĝi petadas nur al vi, neperfortita patrino  
 — patrino mia el tenebroj varmaj,  
 sino nur de tie kie la vakuo regas —  
 mian amon, mian amon iĝinta jam vi, iĝinta vi per si mem.

Ankoraŭ mi dezirus, patrino,  
 apogante mian kapon sur vin,  
 turni la frunton mian al la ĉielo,  
 rigardadi alten — al la lum', al la lum' absoluta —  
 kaj spertadi vian sinan varmon kliniĝinte sur ĝin,  
 kaj kontempli la lazuron, la gajan esperon,  
 la promeson de Dio, la antaŭsentitan aman frunton.  
 Kiel bone, el vi, sur via karno varma kaj fortika,  
 observi la purajn ondojn de la bonfarema diaĵo!  
 Ho vidi la lumon ekaperi en la oriento, kaj meze de  
 nuboj ŝtorm-graveda  
 kontempli, dummomente, la senmakulan frunton dian disradii,  
 kaj tiujn senfundajn okulojn bonfaremajn  
 en kiuj la elstara mondo deziras tute sin imiti  
 kaj luli sin en marondad', el stela ŝenmanka maro  
 kompendianta je steloj, sunoj;  
 dum sonoras la universala muzik', jam fariĝinta pura frunto,  
 tremradianta amo, lumo bela, feliĉec' senlima.

Tiel, kara patrino,  
 vi povas bone scii — tion vi scias, ĉar mi sentas vian  
 sekretan kison de saĝeco —  
 ke la maro ne sufiĉu, ke ne sufiĉu la arbaroj,  
 ke iu rigard' obskura plena je mistero homa  
 ne sufiĉu; ke ne sufiĉu, patrin', la amo,  
 samkiel ne sufiĉu, ja, la mondo.

Patrin', patrin'! Sur via brusto bela,  
 lasu ke mi, tenere apogite sur ĝin, tiel diru al vi  
 mian sekreton. Jen, kiel larmo mia  
 kisas vin; ho, vi, kiu ankoraŭ nutras min,  
 patrino, kies profunda sciado subtenas min — tiun, kiu  
 estas tute via.

Vicente ALEIXANDRE

(El la poemlibro «Ombro de la Paradizo»)

El la hispana tradukis

Gabriel MORA i ARANA

*Okaze de la filmo «Holocaust» («Ekstermado»), montrita ĉi-jare en la televido de Usono, Germanujo, Francujo, Israelo kaj aliaj landoj, ni tradukis jenan poemon de unu el la plej grandaj jidaj poetoj.*

*La poemo estas tre bona kaj frapa; ĝi rememorigas per sia koncizo kaj dubkomprenata emocio plurajn poemetojn de Heine. La aŭtoro kaptis la amaran animstaton de la ĥasidisma majstro, Rabi Levi-Jiĉĥak el Berdiĉev, kaj priskribas, kiel ĉi tiu estus reaginta vid-alvide de la granda agonio, kiu trafis la judan nacion. Ni prezentas ĝin kiel aldonon al la artikolo «El la Jida Religia Poezio» (Horizonto, n-ro 10, Julio-Aŭgusto 1977).*

La tradukintoj

## A M R O M P O

Icik Manger

(«Brojgez»)

Reb Levi-Jiĉĥak en preĝ-ornamoj  
 de sia loko sin ne movas:  
 El la surpupitra preĝolibro  
 laŭtlegi vorton li ne povas.

Image li vidas la bildojn de l' Geto:  
 teruro, angor' kaj agonio...  
 Obstine muta, la maljuna rompita  
 kun sia maljuna Dio.

El la jida, kunlabore tradukis:  
 N. Z. Maimon kaj G. Waringhien

# RAKONTO PRI JUDA FORĜISTO KAJ TIES EDZINO

*Ephraim Sevela*

Kaj nune aŭskultu do kio okazis en nia «stádel»<sup>1</sup>, unika evento kiun mi ne kredus, se ankoraŭ hodiaŭ ne estus vivantaj atestantoj, kiuj ĉion proprokule vidis. Ne judaj atestantoj kompreneble. Por aŭdi judajn atestantojn, necesus ilin revenigi el la alia mondo.

Nu, aŭskultu min kaj min ne interrompu. Mi jam iun tagon rakontis ie tiun historion, kaj tie ĉeestis kuracisto. Nu, li diris, ke tiaj eventoj estas neeblaj, kaj ke temas pri nura inventaĵo. Mi ne estas kuracisto, kaj ĉio kion mi scias pri medicino, estas kio min doloras kaj kio min ne doloras. Sed kedu min, la hodiaŭaj kuracistoj, ili scias ankoraŭ malpli ol tio: Ili scias nur kio estas en iliaj libroj, sed kiel ĉio okazas en la vivo, ili ne volas scii. Sed ĝi estas ilia afero. Ke ili kuracu la homojn laŭ siaj libroj kaj ke ili ilin difektu tiom, kiom ili volas. Mi scias nur ion: La realo superas la fikcion. Tial, ne estu kiel ĉi kuracisto kaj min ne interrompu.

Do, kion mi intencis rakonti al vi? Ha jes. En mia «stádel» estis iu judo. Sed vi tuj diros al mi: Jen kiu malkovris Amerikon. Kiuj ja loĝas en la «stádel», krom judoj? Ĉio tio estas vera. Sed tiu judo, li ne estis tute kiel la aliaj. Kvamkam, en nuna epoko nur Dio scias, kiu estas judo kaj kiu ne estas.

La nomo de ĉi judo estis Mojŝe. Kaj li estis forĝisto. Li forĝis hufoferojn, faris najlojn; ringis radojn kiel ĉiuj forĝistoj. Kiu alia laborspeco estus en malgranda urbeto? Nenio direnda, li estis bona forĝisto, kio nomiĝas unuaklasa forĝisto. Iafaĵe oni kondukis al li ĉevalon plej maltrankvilan. Eĉ la kamparano al kiu apartenis la ĉevalo ĝin timis. Kaj jen Mojŝe kiu tiel rigardis la ĉevalon kaj kiu ĝin tiel skoldis —lia palato estis kirasita kaj mi post momento diros kial al vi—, nu la ĉevalo estis pro tio paralizita de stuporo kaj ĝi lasis sin hufoferi kvazaŭ obeema infaneto, dum Mojŝe enprofundigis la najlojn en ĝiajn hufojn. Kial la palato de Mojŝe estis kirasita, ne estas mistero en tio. Mojŝe neniam malfermis sian forĝejon antaŭ ol trinki akvoglason plenan je vodko. Kaj, antaŭ tagmanĝi, li enŝutis la saman porcion, kaj ĝin ne akompanante de la plej malgranda antaŭmanĝaĵo. Li nur viŝis siajn lipojn pere de sia manikodorso.

Kiu judo povus tiel agi? Gustas kion mi diris al vi, li ne estis kiel la aliaj kaj la judoj lin evitis. Vera gojo li estis. Oni ne povis lin enirigi en la sinagogon, eĉ tirante lin pere de ŝnuro. Kaj li estis sepdekjara, nek pli, nek malpli. Se ni povus fariĝi tiel aĝaj!

Li parolis malmulte, sed kiam li malfermis la buŝon, ne nur la normalaj ho-

moj, sed eĉ la ĉevaloj kvazaŭ retroiris. Necesas diri al vi, ke Mojŝe estis estinta soldato en la cara armeo dum la rusa-japana milito. Kaj li tie eklernis paroli ruslingve. Li sakris tiel malĉaste, li konis tiel terurajn blasfemojn, ke la maljunuloj diris, ke rilate lin eĉ urba policisto aspektis kiel bone edukita infano.

Mi tion jam eldiris, li ne estis kiel la aliaj judoj, kaj krom por negoco la homoj eĉ ne parolis al li; tute nigra, densbarba, malhela kvazaŭ stormĉielo, li fetoris je unu kilometro ĉirkaŭe kiel karbo kaj vodko kunigitaj. Vivi sub la sama tegmento kun li, estis tre limigita plezuro. Malmulte da homoj tion akceptus, eĉ se oni ilin multe pagus por tio.

Sed estis iu, kaj lin milde toleris. Lia edzino: Tojba<sup>2</sup>. Ŝi estis kolombo, necesas ĝin diri, ver- kaj figursense. Malalta, kvietata, bona. Ŝi eĉ ne molestus muŝon. Afabla kun ĉiuj kaj ĉiam ridetanta. Ŝi pasis kun li sian tutan vivon. Ĉu vi konscias? kaj ŝi havis sep filojn, verajn taŭrojn kiel Mojŝe. Sed vere pli inteligentaj ol li. Ĉiuj sep altiĝis, poste ili disiĝis kvarventen. En Amerikon, en Rusion, kaj unu el ili eĉ migris al Brazilo.

Sed en la patra hejmo, en la «stádel» sep portretoj estis muralkroĉitaj kaj la domo estis malplena kaj funebra kvazaŭ poŝo de almozulo. Kaj oni aŭdis bruon nur la tagojn dum Mojŝe troe trinkis. Tiam oni aŭdis frakasojn de falanta tele-raro, kaj la homoj pasis kurante plej rapide antaŭ iliaj fenestroj, kaj en la fundo de sia koro ili ploris pri la sorto de l' povra kaj malfeliĉa Tojba. Unuvorte Mojŝe estis terura viro kaj nur al sia plej malbona malamikino oni povus deziri tian edzon. Kaj krome, kondiĉe ke oni mem estus senkora.

Kaj vi ne kredos min, ĉi virino neniam plendis antaŭ iu ajn kaj neniam, neniam ŝi plej diskrete malbenis sian edzon. Male, ŝi nur diris plej grandan bonon pri li, kvazaŭ li estus sankta viro.

Kaj nu, jen, kie li estas ĉi kuracisto, kiu min interrompis! Li nur klarigu al mi laŭ siaj libroj kial tiel estis kaj kiel oni devas ĝin kompreni.

Estas vere, ke Mojŝe neniam eĉ ekfrape- tis sian Tojba-n. Mankus nur tio. Li ja kapablus mortigi ĉevalon per pugnofrapo. Kaj krome devus ja resti en lia fundo io juda.

Jen do kiel ili vivis. Kaj la viroj timis Mojŝe-on kaj kompatis Tojba-n, ka' la virinoj tre kontentiĝis esti bonŝanca: almenaŭ ili, ĉar ili trovis bonajn edzojn: kiuj ilin ne timigis, kaj kontraŭ kiu'n ili eĉ povis krii tiom, kiom ilia koro ilin instigis. Vi konas ilin, niajn edzinojn: oni povas ilin ne nutri, kondiĉe ke oni per-

mesu al ili krei kontraŭ sian edzon. Sc ne, ĝi ne estas vivo.

Niaj povraj edzinoj — ke la tero estu por ili milda kiel lanugo —, se estis aro kiun ili kapablis, ĝi estis vere tiu ĉi. Kaj ili ĝin ŝatis.

Tojba toleris obeeme ĉiujn afliktojn, kiujn la bona Dio al ŝi alsendis, sed la homa koro ne estas el ŝtono. Ĉio havas sian limon.

Kaj iun belan tagon, paralizo ŝin teren ĵetis.

Vi konscias, kuŝi sur lito, ne povante fari iun movon, dum tri longaj jaroj. Kaj atendi, ke viro kiel Mojŝe vin manĝigas pere de kulero.

Pli bone estus tuj forpasi, por ke tio finfine finiĝu. Sed la vojo de Sinjoro Dio estas nepenetrebla kaj Tojba restis en la lito, tute sola en malplena domo. Ŝi rigardis la portretojn de siaj filoj kaj preĝis Dion, ke Li lasu ŝin morti.

Mojŝe martelis en sia forĝejo dum la tuta tago, blasfemante kaj sakrante kiel ĉaristo. Li rehejmiĝis malfrue, kuiris sur la forno ian kaĉon. Englutis glason da vodko, kaj ne rigardante sian edzinon, planken strabante kiel besto, li ekmanĝigis Tojba-n pere de kulero.

Tiu nutrado ne estis io vidinda, kredu min. La plej tenera vorto kiun li kapablis diri al sia edzino estas «putraĵo». Senkulpigu min, sed mi diras la veron. Kaj necesas ĉion verame rakonti.

Kion oni povas kontraŭe? Li estis tia. Eble li intencis diri ion pli plaĉan. Sed ĝi ne venis. Sur la lango li havis nur bufojn kiel oni diras.

Iafoje, post kiam li hufoferis ĉevalon kaj post kiam li fortapugne batis ties dorson tiagrade, ke li preskaŭ ŝancelis ĝin, li diris, sen ke oni tre bone scias, ĉu li parolas al la ĉevalo aŭ ĉu li monologas: «Bone, tiel sufiĉas. Mi tuj manĝigos mian putraĵon».

Nur al siaj malamikoj oni povas deziri tian nutrantan patron.

Unu jaro pasis, kaj poste alia kaj kva-zaŭ intenca fakto, Tojba ne forpasas. Mojŝe frapis sian amboson dum la tuta tago, kaj matene kaj vespere li manĝigis Tojba-n pere de kulero. Li blasfemas kiel ĉaristo, sed li mem lesivas kaj eĉ lavas sian maljunan edzinon. Neniu tion vidis, sed la virinoj, kiuj eniris ĉe ilin, ŝin ĉiam pura trovis kaj bone zorgita.

Kaj la domo estis atente ordita. Kaj eĉ ne troviĝas polvo sur la planko.

Kaj nune komenciĝas la plej grava epizodo. Eksplodis la dua mondmilito. Jam la duan tagon la nazioj alproksimiĝis nian malgrandan urbeton. La judoj fuĝis. Ili kunprenis siajn posedaĵojn, ili forkuris por sin ŝirmi kontraŭ la nazioj.

Ili pasas kurante antaŭ la forĝejo, ili aŭdas la forĝiston marteli. Ili tien rigardas kaj ekkrias:

—Mojŝe, vi estas freneza! Ĉiuj fuĝas! Ĉion forlasu! La nazioj alvenas!

Sed li, li batas sian amboson, li ne ekri-gardas.

—Mojŝe, ĉu vi aŭdas? La nazioj! Fuĝu kun ni! Tie ĉi oni vin mortigos!

Li demetas sian martelon kaj ilin rigar-das:

—Kaj al kiu mi lasos mian «putraĵon»?

Vi komprenas? Li ne foriris. Li restis pro Tojba. La aliaj, la plej piaj, forlasis siajn oldajn malsanulojn, kiuj ne kapablas marŝi, kaj ili forŝtelis sin. Sed Mojŝe restis. Li, la ebruiulo, la malpli ol nenio, la bandito. Neniu parolis pri li alie en la malgranda urbeto. Li ne foriris kun la aliaj. Li ankoraŭ dum unu aŭ du tagoj batis la amboson, tiom longe kiom restis farenda laboro. Poste li sin enŝlosis kun Tojba kaj ne plu elhejmiris. Li restis sidanta apud ŝia lito, li ŝin manĝigis pere de kulero kaj li ŝin abunde regalas pere de la plej gratenitaj insultoj. La plej tenera el liaj terminoj estis «putraĵo», kiel jam dirite.

Kiam komenciĝis la opa arestado, la polico ekstraserĉis ĉiujn judajn domojn. Ĝi eniris ĉe Mojŝe-on. Tojba kuŝis sur sia lito, paralizita, kaj per teneraj okuloj kiel patrino rigardas sian infanon, ŝi kontem-plis sian sombran edzon.

Oni ordonis al tiu ĉi ekstati, li obeis. Li rigardis sian edzinon kaj liaj okuloj ŝin adiaŭis. Kaj subite ŝi ekmoviĝis.

Vi komprenas? Tri jarojn sen la plej eta movo. Kaj jen, ne atendite, ŝi eksidas! Ŝi rigardis sian edzon, poste la nazioj, kaj ŝi ridetis.

—Momenton, diris ŝi, kaj jam de tri jaroj ŝia lango ne moviĝis en ŝia buŝo. Ne prenu lin sola, mi lin akompanas.

Tio estis eksterordinara miraklo. Sed ankoraŭ pli eksterordinara estis la fakto, ke tia miraklo trafis maljunan iudinion, kiu dum sia tuta vivo nur kredis al Javeo, nur legis Torao-n kaj nur studis Talmudo-n.

Sed vere, la bonkoreco de Dio estas sen-lima kaj liaj vojoj nepenetreblaj.

Kaj ŝi ellitiĝis. Kvazaŭ ŝi estus neniam paralizita. Ŝi ridetante alpaŝis sian edzon. Ŝi prenis lian brakon kiel malnovtempe, kiam ili estis junaj. Kaj ili marŝis kune. Kaj kune, sin tenante tiel, kun brako en brako, ili staris ĉe la rando de l' fosaĵo. Kaj Tojba rigardis sian edzon pere de amplenaj okuloj. Kaj kune, ĉirkaŭbrakitaj, ili falis en la kavon, kiam oni ekpafis.

Kaj la kuracisto kiu diras... Estas nenio direnda... Kion ili konas pri la vivo, ĉi kuracistoj?

*Esperantigita de Doktoro  
Georges Salan*

<sup>1</sup> Stadel jidlingve signifas malgrandan urbeton, en kiu loĝas preskaŭ nur judoj.

<sup>2</sup> Tojba = Kolombo, jidlingve.

Czesław Ostankowicz /1910 —/  
//Fragmento el la libro:  
«Ziemia parujaca cyklonem»/  
«Tero vaporanta ciklonon»//

## Suspektita pri eskapo

La penso pri eskapo estis por ni ĉiuj komuna kaj se ne tio, ke estis aplikataj kolektivaj persekutoj laŭ principo: kontraŭ unu eskapinto, dekon je morto, kaj se ne elpenso de lagerkomandanto, t.e. de la ĉefo de la koncentrejo, ke kontraŭ ĉiu forkurinto oni veturigu la tutajn familiojn al la koncentrejo, kie oni tuj mortpafadis maljunulojn kaj infanojn, se ne la konscio pri tio, ke en la okazo de sukcesa eskapo, punaj laboroj dekumos kamaradojn — eskapus ĉiu dua el inter ni. Multaj pretigadis sin por la «okazo» forkuri, kio en la jaro 1941 estis io tia tute nereala. Kaj tamen, malgraŭ tio, la esesmanoj estis speciale sentemaj pri ĉiu ŝajna planado de «neleĝa forlaso de lager». La kaptitoj estis mortigataj post antaŭa torturado kaj starigo kontraŭ la pilorio. Kun la tabulo, sur kiu estis skribite: «Jen, mi denove estas ĉi tie», en klaŭna ĉapego sur la kapo, batante tamburon — li preteriradis antaŭ ni rezignaciita, jam nur atentanta la kuglon, kiu savos lin de turmentoj.

Ĝis hodiaŭ mi ne scias, kiu denunciis min antaŭ la esesmanoj pri tio, ke mi intencas eskapi. Post la vespera raporto oni elteris min el tabullitaĉo. Mi estis trenita al bunkro. La sekvontan tagon mi stariĝis antaŭ la vizaĝo de lagerführero Fritzsck kulpigita pri planado de eskapo, kune kun Maks Pilat //nun artisto-muzikisto, fagotludanto en opera orkestro en Gdansk//<sup>\*</sup> kaj kun kelkaj aliaj. Mi estis «demandata» longajn horojn pri la nomoj de la kvazaŭaj kunuloj, pri Maks Pilat, pri kontakto kun la homoj de ekster la koncentrejo. Lagerführer Fritzsck transdonis min en la manojn de plenumantaj funkcion suboficiroj. Komenciĝis la pridemandado denove.

Mi neis, neis, neis...

Mi revenis al konscio en la bloko 20.

<sup>\*</sup> Ekde la jaro 1947, tuj post mia reveno el koncentrejo, mi — tradukanta tiun ĉi libron — laboris kune kun kol. Maks Pilat dum kelkaj jaroj en orkestro de Wrocław Operejo. Poste li transloĝiĝis al Gdansk je daŭra restado, kie li estis ankaŭ muzikprofesoro. /Pri travivaĵoj de Maks Pilat oni povus verki apartan skuan dramverkon — J. S./

### FOSTO

La esesmano stariĝis apude. Malliberulo d-ro Jan Pawlikowski ne havis elekton. Li skribis: «Li taŭgas por puno». Li diris al mi kelkajn konsolajn vortojn. Oni forkondukis min al la bloko 13. Ĉe enirejo akceptis min el la manoj de flegisto altstatura esesmano. Poste transdonadis min al si el manoj al manoj germanaj malliberuloj

el Punkompanio /nomata SK = Strafkompagnie — J. S./ Kiam mi trovis min en la ĉambrego de torturoj, en subtegmento de SK — mi havis en la buŝo guston de sango, kaj sub la kranio haoson.

Oni tralegis al ni «verdikton». Mi estis punota je «fosto». Komenciĝis pendigado. Eltorditajn surdorsen brakojn la ekzekutistoj ĉirkaŭligadis ĉirkaŭ manartikojn per ĉeno. Poste la «kapo» de bunkro jetadis supren la korpon de deliktulo, alkroĉante la ĉenon al hoko. Tiam la homo komencis hurli. Mi atendis mian vicon. Apude oni skurĝis iun. Mi kalkulis kune kun la torturito: dudek kvin batojn per bastono. En najbareco oni piedfrapis kuŝanton sur planko. Li havis ligitajn kubutojn. Li ne povis ekstari. Li ne povis ŝirmi sian mal-supran parton de la ventro kontraŭ la botbatojn.

Proksimiĝis al mi karneca blondulo. Tiun esesmanon mi memoris el Politische Abteilung. Li pridemandadis mian kolegon, kiun post «pridemando» ni forportis rekten en kadavrejon. Malantaŭ li staris bunkrokapo. Melankolia, neniam ekride-tanta bandito, punita je vivdaŭra malliberejo, pro malvirgigoj, rabado kaj murdoj.

—Kun kiu vi volis eskapi? — tradukis interpretisto.

—Mi ne volis eskapi el la lagero — mi komencis la rekantaĵon de antaŭ semajno, kiam lagerführer Fritzsck postulis de mi, por ke mi malsekretigu miajn kamaradojn komplotantojn, kvazaŭ de la jam malsekretigita eskapo.

—Ne estu stulta — tradukis la vortojn de esesmano la kolegointerpretisto. —Vi ne pendos, sed se vi ne diros tiujn nomojn, vi ne eliros el SK. Tiel diris Herr Hauptscharführer. Ĉu vi komprenas?

—Mi komprenas — mi respondis germanlingve. —Sed mi ne volis eskapi el KL Auschwitz.

—Pendigu — diris la esesmano.

La «kapo» suprenigis min pli delikate ol la aliajn. Mi ekpendis inter plafono kaj planko, kaj poste terurega doloro de tordataj humeraj artikoj trapikis mian tutan korpon. Same, kiel iu spado trapikadus antaŭe la manojn, poste la bruston, kaj poste tiu iu ŝanĝus la direkton de la klingo, ĉar mi eksentis la doloregon en la malantaŭa parto de la kapo.

Apud mi komencis hurli Hugo Müller, brava polo-patrioto. Mi ne miris la hurladon. Temis pri tio, ke al unuj helpadis elteni torturojn la blekego, al aliaj — kiel al la pli maljuna kolego pendanta tuj

apud mi — kunpremitaj ĝis spasma kuntiriĝo de dentoj, al aliaj la retenita spiro. Mi tenis en memoro la konsilon de bunkrokapo, al kiu ĉiam imponis tiuj, kiuj ne perfidis kolegojn. Tiu konanto pri suferigado de siaj viktimoj, psikologo pri ĉeloj de malsatmorto, fakulo pri speco de torturoj, diris al mi, kiam la atenton de esesmanoj okupis ies agonio: «Mi ne kredas je Dio. Vi mem komprenas, ke li ne estas, se ekzistas Auschwitz. Sed por vi, poloj, helpas elteni la horojn de fosto, kiam vi rondripetas la saman preĝon».

Mi komencis preĝi: *Ave Maria*. Senĉese mi ripetadis la samon kiel aŭtomato. Pensante nek pri minutoj de la turmentoj, kiuj trenas sin malrapide, kiel tio ĉiam okazadis en torturĉambro, nek pri tio, ĉu oni liberigos min el Punkompanio ne tenante min en bunkro, nek pri io alia, krom pri la vortoj de la jam delonge ne eldirata preĝo.

Oni komencis malsuprenigadi nin el la fosto. Antaŭ ĉio tiujn, ĉe kiuj silentiĝis la koro, ĉar je la koro plej ofte estis mortantaj la punitoj per tiu torturo. Poste tiujn, kiuj svenis pro doloro.

Ankaŭ laŭleĝe. Se iu svenis, oni devis lin rekonsciigi kaj pendigi ankoraŭfoje. La tempo jam «trapidita» ne estis kalkulata. Oni devis pendii «de komenco».

Tial ripetante en penso *Ave Maria* mi timis svenon.

Laŭ la permeso de la aŭtoro  
el la pola esperantigis:

*Jan Smykalski*

*Rimarko:* En la rakontoj estas troveblaj iuloke parolturnoj ne esperantaj, prenitaj el t.n. *Lagersprache* t.e. el la koncentreja slango. Ĝi kreiĝis sub influo de multaj nacioj, kiuj troviĝis en koncentrejo, kaj estis uzata same de malliberuloj kiel ankaŭ de esesmanoj, ĉar ĝi estis plej simpla koncentreja lingvo laŭ fonetiko, fleksio kaj sintakso, per kiu oni interkompreniĝadis en la koncentrejo. Fakte tiuj esprimoj estas gramatike eraraj same en la germana kiel ankaŭ en la pola kaj en aliaj lingvoj, sekve ankaŭ en Esperanto. En la verko estas multaj tiaj parolturnoj. Ili tamen enkondukas en la tekston specifan aŭtentecan de la vivo de la homoj, kiuj tie vivis, suferis kaj pereis. — J. S.

## IDUS MARTIE

la 15-a de marto j. 44 a.K.

### Monologo

(Murmuro de la homamaso; krioj, ekscitaj sonoj, laŭta diskuto. Subite aŭdiĝas la soldataj paŝoj iompostiome alproksimiĝantaj. La bruo sporade sufokiĝas. Kiam Cezaro atingas la katedron regas plena silento).

Cezaro: (la voĉo estas rimarkinda, kvieta kaj senekscita en la komenco).

Ho, Senatanoj, ho, Popolo Romana, hodiaŭ estas Idus Martie, la tago de mia morto, pri kiu mi eksciis antaŭ la foriro al la Senato. Cetere la komploto kaj la listo de la konspirantoj ne meritas mian atenton pro la fakto, ke mi neniam zorgis pri tio, kion mi ne povas eviti.

Jam de la frua junaĝo la morto min akompanis regule; ĝi masakris en la nomo de Sullo kaj ĝi amasbuĉis en la militentreprenoj.

Ho, vidalvida malamikaro, kies konspiro mortigi min prezentigis sur la batal-kampo kiel reciproke heroa ago, (ironie) sed ĉu vi timigu min tie ĉi, ho, amikoj noblaj kaj kaŝantaj la mortigilojn sub la protekto de viaj ceremoniaj togoj?

Kiom fortaj vi estas, ho, malfortuloj? Tie ĉi mi solas dum ekstere perfortas mia brava armeo, kiu pretas niveligi al la tero la toksajn ĉelojn de viaj ĝroteskaj animoj.

Ho, Senatanoj Romanaj, kial vi ne venis en mian propran domon, en kiu vi procesie almozpetis eĉ panerojn de la ŝtataj postenoj? Kaj nun vi kolektis la Roman luparon, kiun mi senofice forpelis, ĉu vi prenis sur vin la malfacilan taskon stimuli la bestan ambicion? Kaj vi elektis tiun ĉi sanktan lokon de la Romana Imperio en kiu vi anstataŭigas la sanktajn leĝojn per konspiro kaj murdo.

Ho, patriciaro Roma, kiu el vi pretas ĉesigi mian vivon? Kiuj ajn estas viaj nomoj, ĉu Cassius, Junius Brutus aŭ surliste sekvantaj, mi ne kredas, ke la murdistoj estas tiuj, kiujn mi amas kaj helpadas. Ĉu la postkulisa preparo de la komploto estas la detruo de la paca simbolo kaj de mia vivocelo? Ĉu la idealo al kiu mi dediĉis kaj oferis la tutan energion, dum vi orgiis sur molaj kusenegoj, igos vin konsideri, ke mi kune kun la soldatelito de la Imperio, sange ŝvitis nur por kontentigi la instinkton de la grota ido?

Ho, konspirantoj Romanaj, pro kio vi aspiras mian morton? Ĉu vi min akuzas pri tio, ke mi batalis por tiuj, kiuj restas ĉiam de vi forgesataj, anstataŭ pleniĝi viajn jam plenigitajn poŝojn?

Ho, Romaj oratoroj, publikigintaj la epistolojn pri miaj malvirtoj, kiu el vi protektos la mizerulojn de la kirasita Imperio?

Ho, vi saĝuloj kaj intelektuloj Romaj, ĉu viaj filozofiaj verkoj pri devo kaj maljuneco demonstras la pruvon pri tio, ke la prudenta konscio vin ne forlasis. Ĉu vi ne hontas, ke viaj famaj surpaperigitaj pensoj havas rilaton al murdo kaj malmoralo?

Ho, ĉaste malĉastaj vandaloj? Ĉu vi planis mortigi min pro tio, ke mia malforteco nomiĝas virino? Kiu el vi indas ĵeti pezaĵon sur miajn ŝarĝitajn ŝultrojn nur pro tio, ĉar mi defendas la malfortan sekson? Ĉu vi neglektas la stimulojn de la amaj elfluaĵoj el kies fonto vi ĉerpas eĉ krimulajn ambiciojn? Ĉu mi detruu la egiptan kulturon ne gardante ĝiajn limojn kaj trezorojn eĉ el la alkovo volupta?

Ho, kanajlaro Roma, vi riproĉas min, ĉar mi transformis la aristokratian Respublikon en la Romanan Imperion en kiu regas la popola partio. Ĉu gravas la nomo de la ŝtata formo, se en ĝi la bonstato floras?

Vi kritikas la pompajn titolojn de la Gvidanto Imperia. Jes, generalo, imperatoro kaj diktatoro estas miaj publikaj nomoj. Mi demandas vin pri tio, ĉu la persona karaktero dependas de nombro de la titoloj? Ĉu mi metu la sange akiritan fortouzon en viajn ricelistajn manojn, en la manojn, kiuj marodis kaj predis la malsatan kaj soifantan popolon en la nomo de justeco kaj bezono?

Ho, tiranoj de la Romana Imperio, ĉu vi mendis la bigotan hipokritecon kaj pagis ŝajnan respekton per rabista mono? Ho ve tiuj kiuj sorbas la povon ne pro tio, ke ĝi estu la protektanto de paco kaj prospero, sed la rimedo kontraŭ la plebanaro.

La meritojn miajn vi ne tabeligas, ĉar ili pekigas viajn projektojn min mortigi en la nomo de la falsaj neceso kaj doktrino; pri la grandaj sociaj reformoj, pri dungado de miloj da senlaboruloj, pri publika konstruado en la tuta Romana Imperio kaj pri tera donaco al multaj senhejmuloj. Jes, pri tio vi silentas. Panem et circenses! Mi ne trankviligas la povran popolon doninte al ĝi panon kaj ludojn laŭ maniero de viaj instrukcioj. Se la popolo ne satiĝas kaj ne amuziĝas kontinue, la paneroj, kiujn vi disŝutadas tempaltempe, kiel Jupiteran mistifikon, fruktos la revoluciajn impulsojn kies veneno vin sufokos.

(dangera murmuro en la Senato, minacaj krioj miksiĝas kun la ĝojaj. Cezaro parolas pli kaj pli ekscite kiel persono, kiu volas antaŭ la morto ĉion diri.)

Ho, proskribitoj de la propra lando, silenton mi postulas. La lastajn vortojn mi gravuros en viajn ŝtonigitajn korojn kiel rememoron pri tio, ke vi entombigas ne nur la simplan soldaton kaj la generalon de la Romana Imperio, sed ankaŭ la estontecon de la proleta klaso.

Ho, subfosantoj de la humana verko, via intenco disigi min de la potenca armeo ne estis homama ago, sed la plano mortigi la protektanton de la malsupra klaso, kiun vi malamas kiel lepran almozpetulon. Min ne timigas viaj ornamitaj kalumnioj, intrigoj kaj malicaj dusencaĵoj per kiuj vi sukcese ribeligas la roman junularon kaj eĉ miajn plej sindonajn amikojn.

(patose) Mi mortos kun la espero, ke miaj posteuloj finpretigos la komencitan verkon. Venu, ho murdistoj Senataj kaj haltigu per mia morto tiun organizitan kaŝludon.

(plena silento regas. Neniu moviĝas. Cezaro krias malpacience):

Venu, ho elegantaj murdistoj, mi malfermis la togon kaj direktas la bruston. (audiĝas singarde alproksimiĝintaj paŝoj).

Cezaro: (indiferente sed milde)... kaj ankaŭ vi, mia filo, Junius Brutus?-

(oni aŭdas sonpuzon kaj falon. Samtempe urĝas aliaj kaj batadas ponarde. La lastaj agoni-krioj. Dum sekundo ĉio silentiĝas, post tio ekregas paniko; eĥoj, helpokrioj, kaj fine militistaj paŝoj.)

---

Se vi volas esti daŭre informata pri la fakta situacio en UEA, mendu tuj abonon al *Horizonto*, legu ĝin atente kaj diskonigu ĝian enhavon.

---

*Horizonto* estas la sola sendependa periodaĵo, kiu profunde analizis la novan statut-projekton de UEA. Diskonigu tiujn gravajn artikolojn.

## INTERNACIA ESPERANTO-ASOCIO DE JURISTOJ (IEAJ)

### *Nova Plenuma Komitato*

Per skriba voĉdono la membraro de IEAJ ĵus elektis la novan Plenuman Komitaton de la Asocio. Ĝi konsistas el Prof. Dro Ivo Lapenna (Universitato de Londono) kiel prezidanto kaj samtempe redaktoro de *Internacia Jura Revuo*; Direktoro Ralph Harry, nun Direktoro de Aŭstralia Instituto pri Internaciaj Aferoj (Canberra), kaj Dro St. C. Anagnostakis, eksterordinara Profesoro en la Universitato de Ateno, kiel vicprezidantoj; Dro Klaus Perko, ŝtata oficisto en Graz, Aŭstrio, kiel sekretario-kasisto. Ĉiuj menciitaj funkcioj estas elektitaj unuanime.

### *Nova Numero de Internacia Jura Revuo (IJR)*

La organo de la Asocio estas *Internacia Jura Revuo*, kiu aperas du fojojn jare. Ĉiu n-ro estas minimume 48-paĝa plus kovriloj. La enhavo estas varia kaj interesa ne nur por juraj fakuloj, sed ankaŭ por ĉiu klera persono. Verkita, krome, en modela Esperanto, ĝi estas rigardata de ĉiuj legantoj kiel la plej bona faka periodaĵo iam ajn publikigita en la Internacia Lingvo. N-ro 1/79, jam finredaktita, aperos antaŭ junio 1979. En ĝi troviĝos artikolo de Prof. I. Lapenna pri «La Koncepto de Neŭtraleco en internacia Juro kaj Internaciaj Rilatoj»; artikolo de Kirsti Bull, docentino en la Universitato de Oslo, pri neregistrita aŭ fakta geedzeco, demando tre aktuala en multaj landoj, en traduko de Kand. jur. Tom Arbo Høeg, la teknika redaktoro de la revuo; artikolo de Dro. K. Perko pri la unua referendumo en Aŭstrio; «Sugestoj por Kompletigo de la Jura/Diplomatia Terminaro» de Dro. L. Dubravsky el Budapeŝto; pluraj interesaj informoj en la rubriko *Notoj*, 1-2 recenzoj en la rubriko *Recenzoj*, *Oficiala Informilo de IEAJ*.

La membroj de IEAJ (kotizo 120 aŭstriaĵ ŝilingoj) ricevas la revuon senpage. Aliaj povas ĝin aboni (jarabono, same, 120 aŭstriaĵ ŝilingoj). Ĉiujn informojn kaj provokzempleron oni povas ricevi de la sekretario-kasisto *Dro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio*.

### *La Jara Ĉefkunveno de IEAJ Okazos en Ateno*

La plenuma Komitato ĵus decidis, ke la sekvanta jara ĉefkunveno de IEAJ okazos en Ateno dum la 5-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado (08-15 de septembro 1979). Detaloj pri la prelegoj kaj tagordo troviĝas en *Internacia Jura Revuo*. Aligiĵojn kaj ĉiujn informojn pri la Konferenco donas la *Loka Konferenca Komitato, c/o Sino Ada Sakellaropoulou, Sokratous 48, Omonia, Ateno (101)*. La Plenuma Komitato alvokas ĉiujn membrojn, abonantojn kaj aliajn interesigantojn aliĝi multnombro.

### **GRAVA ATINGO DE "FRATECO"**

(Aragona Esperanta Societo — Zaragoza)

Ekde la 24-a de aprilo, ĉiumarde surondiĝas nova programo en Esperanto duonhora, sub la titolo «Esperanto en la Populara Radio». — La programo konsistas el informa artikolo pri Esperanto, farata de konataj esperantistoj, elementa rapida kurso, kaj diversaj informoj pri la Esperanto-mondo.

Gvidas la kurson laŭ propra metodo, D-ro Fernando de la Puente.

Kunordigas kaj gvidas la programon, S-ro Enrique Piquero, estrarano de «Frateco».

Prizorgas la informadon, S-ro Emilio Pérez, ankaŭ estrarano de «Frateco» kaj D-ro Joaquín Bielsa.

La programo multe ekinteresis la aŭskultantojn ne nur en Zaragoza, sed ankaŭ en pluraj urboj kaj vilaĝoj de Aragón, kaj de apudaj regionoj.

---

Se vi volas sciigi pri la vera senco de la nova statutprojekto de UEA, legu la verkon *Hamburgo en Retrospektivo*.

---

«Mi devas diri ke, leginte la detalojn en ĉi tiu libro, mi skuiĝis pro la graveco de la situacio.» — H. A. de Hoog en *Dia Regno*.



## EL LA ĈEFKUNVENO DE LA EŬROPA KLUBO

Paderborno — 1978

La estrara tablo en la fono de la ĉasĉambro.

De maldekstre: d-ro G. Kalckhoff, FRG-Munkeno; prof. d-ro Fabrizio Pennacchietti, I-Torino; prof. d-ro G. Boulanger, B-Bruselo; prof. d-ro H. Frank, FRG-Paderborno; pastro Hansjörg Kindler, (Triksini, la magiisto kun la blua ŝtono), L-Luksenburg; prof. d-ro Paul Neergaard, DK-Kopenhago; d-ro W. De Smet, B-Kalmthout; Rikardo Sulco (literatoro), FRG-Mindeno, kaj Heinz m. Bleicher (eldonisto), FRG-Gerlingo.

Fotis, D. Smolić, FRG-Paderborno.

### LA INGENIA HIDALGO DON QUIJOTE DE LA MANCHA

Tiu ĉi grava verko aperis en eldono «Fundación Esperanto» de Hispana Esperanto-Federacio (Eldona Fako) Zaragoza. 820 paĝoj, formato 17,5 × 25 cm, ilustrita, bindita. Prezo: 2.500 pesetoj plus 10 % por sendokostoj.

Havebla ĉe F. E. Sekr. Inés Gastón, P.º Marina Moreno, 35, 4.º dcha. Zaragoza-1, Hispanujo, aŭ ĉe via libroservo.

### 52 - a KONGRESO DE S. A. T.

De la 13-a ĝis la 20-a de julio 1979, okazos la 51-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (S.A.T.) en Swanwick (Britujo).

Informojn kaj aliĝilojn oni povas peti al jena adreso: 29 Farrance Road, Chadwell Heath, Essex RM6 6EB, Anglio.

En ESPERANTO (jan-79) aperis recenzo de Boris Kolher (Soveta Unio) pri «Optimala ortografio de la Internacia Lingvo Esperanto», la projekto de Albert Lienhardt; drasta verdikto: «*Bonintenca laboro, trista rezulto*»... Aperis ankaŭ bizara anonco pri «Le Général et l'anti-Babel» de Pierre Nemours, laŭ kiu anonco la «*bildo de la Movado estas tro fantazia kaj politike tendenca*». Ja, anonime duon-voĉa konfeso de la realo, ĉar «kiu tro sin pravigas, tiu mem sin kulpigas»!

En ESPERANTO (feb-79) tamburas ĉefartikolo: «*M'Bow akceptis UEA-delegacion*». Dume postulante po 3.000 F.F. tage, UNESKO malakceptas ekspozicion de infandeseĝnaĵoj fare de ILEI ĝuste en «*la jaro de la infano*». Laŭ fruktoj oni konas arbon!

Sekvas klarigo pri la kotizoj en UEA: jam de 1974 la financa politiko de UEA estas la kotiz-diversigo, sekve kanadano pagas «*duoble pli ol*» vjetnamo. Ni lasu al la legantoj la zorgon konkludi!

Enestas recenzo de Michel Duc Goninaz pri «*Facetoj de Esperanto*» de W. Auld. Ja ĉi tiu recenzisto montras unu fojon pli, ke li ne kapablas fari recenzon sen politikaj referencoj: «*La esperantistoj ja plorige postlamas ĉiujn nuntempajn revoluciojn, inkluzive ideologiajn*», li konkludas!

Dume GERMANA ESPERANTO-JUNULARO okazigis sian 22-an Internacian Seminarion pri «*Homrajta temo*». «*Prezentiĝis 4 prelegoj... pri la evoluo de internaciaj rilatoj, Amnestio Internacia, la politika strukturo en Brazilo, kaj homaj rajtoj en Israelo*». Sed nenio pri la t.n. socialismaj landoj! Ĉu mirinda konstato?

El intervjuo de William Auld fare de R. Hauptenthal en la Brita Esperantisto (nov-dec-78) la fama skota profeto konfesas: «*Estas stulte, laŭ mi, ke oni ĉiam laŭdadas min tiel afable pri verko, kiun mi verkis antaŭ 20 jaroj, ĉu ne... Jes, mi ne volas resti la aŭtoro de «La Infana Raso». Tio ĝenus min terure, ke post unu eksplodo de verkemo, poste vi kvazaŭ estas laŭdata pro tio kaj nenion faris dume.*» Kaj tamen!... Kaj tamen!... Nu, li aldonas pli poste: «*Mi estis koncernita en la revolucio de Lapenna antaŭ 20 jaroj... Kaj mi partoprenis ankaŭ la kontraŭlapennan revolucion...*» Ĉu memlaŭdado pro tio? Notinda konfeso por la posteularo!

El recenzo aperinta en Revista Portuguesa de Esperanto (mar-79) pri la bulteno «*Perspektivo*»: «*Ni kredas, ke por Esperanto ĉiuj politikoj, respektantaj la liberon kaj la homan respekton kaj ankaŭ la ideojn, estas bonaj politikistoj. Tamen ni ne povas ne bedaŭri, ke homo kompetenta kaj respektinda en la Esperantista Movado kiel Ivo Lapenna, estis tiamaniere abrupte kaj senmotive flankenmetita*». Sed ĉu vere «*senmotive*»? Por la respondo necesas esplori la politikan tendencon de UEA.

KONCIZE (jan-feb-79) anoncas grandan renkontiĝon de gejunuloj en Lille (Francio). Tuj estas kredinde, ke la ĉefa, la plej urĝa temo kaj zorgo koncernos la disvastiĝadon de Esperanto tra la junularo. Nu?... Tute ne! «*La temo de la renkontiĝo estas: problemoj de lingvaj minoritatoj... Kaj... Kaj... «Originala programero, kunligita kun la temo... estos tuj-kurso pri pikarda...» dialekto! Neatendita, ĉu ne? Kaj tiel grava por progresegi esperanton!*

El DIA REGNO (jan-79) signifoplena raporto akcentas, ke «*la ĉeĥaj KELI-anoj same kiel IKUE-anoj en ĈSSR laboras kadre de MEM, same kiel la reprezentanto de KELI, d-ro Rudolf Horsky, ankaŭ la reprezentanto de IKUE jr. Aleš Berka estis ĝis nun vic-prezidantoj de MEM en Praha*». Mankas la precizigo, ĉu tiuj reprezentantoj povus agi ekstere de MEM.

Sed el ESPERO KATOLIKA (1-79) jen ĝuste kelke da precizaĵoj de Antonio de Salvo: «*Kun sincera miro mi legis en «DIA REGNO» la plendojn de kelkaj ĉeĥoslovakaj KELI-anoj, kiuj protestas kontraŭ la onidiroj pri manko de religia libereco en Ĉeĥoslovakio: tio signifas, ke aŭ la diskriminacioj trafas nur katolikojn, aŭ la plendoj havas tre limigitan opinion pri la koncepto de religia libereco (kompreneble ekzistas ankaŭ tria hipotezo, sed mi principe kredas je la honesteco de la proksimumo)*». Kaj post detala elmonro de la diskriminacio en la afero de Herbortice (jul-77) sekvas la konkludo: «*Jam venis la tempo, ke oni ne plu silentu, sed oni forte protestu kontraŭ la misagoj de la ĉeĥoslovaka polico kaj de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio*». Ni aldonu: kontraŭ la nenifareco de UEA, kies membro estas la Ĉeĥa Esperanto-Asocio laŭdire neŭtrala!

Kaj plue el ESPERO KATOLIKA (2-79) jen ĝuste kelkaj linioj de la Ĉefepiskopo de Prago, Kárd. Frantisek Tomášek al Ales Berka en la 7-a de januaro 1979:

«*Mi dankas pro via sciigo pri la afero de la IKUE-sekcio. Vi anoncas, ke oni diris al vi, ke vi trovu «tegmentan asocion en la eklezio». Tio estas tute malplena, nenion diranta frazo, ĉar estas ĝenerale konata fakto, ke ni ne havas la ŝtatan konsenton por havi iun organizaĵon en la kadro de la eklezio.*

Pro tio estas unusola vojo: penadi teni staton kiel ĝis nun, kaj, se tio estas neebla, poste kunfandiĝi kun ili kaj plu teni stian spiriton.»

Jen kiel aplikiĝas la HOMAJ RAJTOJ en Ĉeĥoslovakio!

J. T.



“Agadi per lernolibroj, anoncoj, k.t.p. estas tre bone kaj necese; sed tio ĉi devas havi lokon *apud* la literaturo kaj ne *anstataŭ* la literaturo.”

L. L. Zamenhof

## LIBROJ SUB LA LUPEO

LINGVIKAJ ASPEKTOJ DE ESPERANTO. John C. Wells. 276 paĝoj, Universala Esperanto-Asocio. Rotterdam.

Jen salutinda libreto, ĉar bela, zorge presita, klara, korekta kaj interesa. Jam estis tempo traanalizi Esperanton science, sen la pasio de l' mistika frutempa entuziasmo.

John Wells, fakulo pri Fonetiko kaj membro de la Akademio de Esperanto, traesploris la konsiston de la lingvo laŭ Fonetiko, Morfologio, Sintakso, Leksiko kaj Semantiko. Abundaj komparoj kun la konataj eŭropaj lingvoj kaj ankaŭ kun la ĝenerale ne konataj de la aliaj mondopartoj (eskima, araba, zulua, ĉina k.m.a.) estas kontentiga motivo por tiuj adeptoj, kiuj eble sen sufiĉa scio fidis al Esperanto neniel dubinte pri ĝia universala taŭgeco.

La libro de Edo Bernasconi, ĉi-tie recenzita<sup>1</sup> antaŭ nelonge pravigas la strukturon de Esperanto kontraŭ la latinidaĵoj intermite aperantaj kiel kandidatoj al internacia lingvo. La nuna libro de John Wells kompletigas tiun kaj montras la mezan vojon elektitan de Zamenhof en la tre heterogena monda lingvaro, speco de labirinto kie ĉia pensordo estas ebla eĉ se ne imagebla, kie mankas la natureco de la frazordo, la natureco de la nuraj kvin vokaloj, la natureco de la kazoj kaj prepozicioj...

Juĝate de scienca tribunalo, Esperanto akiras novan prestiĝon; kaj nia konstanta fido al ĝi pro ĝia aplikada natureco en la daŭro de tuta generacio, fariĝas, kun la scio, nevenkebla konvinkeco kaj stimulo por plua uzado kaj uzigo.

Teoriistoj, eĉ se tre fakaj, foje glitas en la rezonado. Tial surprizis min, ke Wells en paĝo 29a asertas, ke Esperanto estas parte Fleksia. Nu, laŭ P.I.V. Fleksio estas «ĉiu el la modifoj kiujn suferas la formo de vorto en la deklinacio kaj la konjugacio». Samloke de P.I.V. estas dirite, ke Esperanto NE estas fleksia lingvo, kaj apud AGLUTINI ni legas, ke Esperanto estas «la tipo perfekta de aglutina lingvo». Fakte neniu vortero modifiĝas. La vorto POMOJN estas dismetebla tiel: POM/O/J/N kies vorteroj rolas ĉiam memstare kaj egale. Ni ne havas unu solan ekzemplon kontraŭ tiu aglutineco.

En la paĝo 59a troviĝas studo pri la demandprocedo. Mi ne konsentas ke la vorto *ĉu* kaj la serio KIO, KIA, KIU... de la vorttabelo estas demandaj; sed, ĉar en recenzo mi ne devas defendi mian herezaĵon, mi diru nur, ke tiuj vortoj rolas kiel konjunkcioj inter la ĉefa propozicio kutime ne esprimata (Mi demandas) kaj la subpropozicio, ekz. (Vi scias) tiel: Mi demandas *ĉu*, *kion*, *kiel* vi scias. Sen speciala intonacio kaj sen reguloj.

Fine de la libro estas 88 bibliografiaj referencoj utilaj al interesatoj. Tiuj samideanoj kiuj volas scii la pozicion de Esperanto en Fonetiko, Morfologio, Sintakso, Leksiko kaj Semantiko, aĉetu kaj trastudu tiun-ĉi libron, tiel zorge presitan.

Salvador Gumá

<sup>1</sup> «Horizonto» n.º 15-a.

DANAI VRAILA Romano, 130-paĝa. Tradukita el la greka originalo Despina Patrinu.

Tiu-ĉi romano havas psikologian fonon. Ĝi spegulas kun nuancoj elegante esprimitaj unu gravan flankon de la nuntempa socia vivo: Knabino — Danai — kreskas en familio, kies patro — juĝisto — ne havas tempon okupiĝi pri ŝi, kaj kies patrino, pro perdita infano dorlotas prefere la pli aĝan filon — Solono — kiu konsiderante sin supera malicete trudadas sian volon al la ne konsiderata fratino.

La sekvo de tiu senama nesto malvolviĝas tra la paĝoj, ĉiam en klara priskribo trenanta la leganton al ĝisfina legado. La rakonto iom post iom malsimpliĝas per enveno de novaj rolantoj kaj la prezento de novaj faktoj, kies rezulto — laŭ mia opinio — estas anatemo al la nuna meĥanika, senfamilieca kunvivado naskanta la junularan deliktemon.

Estas bedaŭrinde, ke tiel belan priskribon, tiel elegantan parolstilon ne ornamas lingva perfekteco. Kiom da makuletoj estus evititaj se alilanda ne greka samideano estus zorge reviziinta ĝin, ĉar neniu ĝibulo vidas la ĝibon! Verŝajne la persisto ne havis sufiĉajn lertipojn kaj la *ŝ* kaj *ĝ* ofte aperas sen la akcento. La *ŭ* estas anstataŭigita per *ü*, sed la ĉefa problemoj estas la pasiva gerundio, kiu, kiel la ak-

tiva nepre devas finiĝi per E kaj ne per A, kion oni ofte faras kaj ĉi-tie tra la tuta libro. «La barko, puŝita de la vento...» pĝ. 7. Ne temas pri iu barko puŝita de la vento, sed pri tiu, kiu puŝite de la vento liberiĝis el la sablo. «Atinginta la kulminon de sia ambicio kaj vidante sian vivon» pĝ. 120. Kial atinginta? Aliloke mi trovis: dronita (dronanta), sidita (sidanta), nigriĝita (nigriĝinta), aliita (aliigita), kuŝita (kuŝante), krucigita (krucumita). «Vi estas sufiĉe granda *por ke* mi tenu vin» devas esti ...*ol ke* mi tenu vin. Demandi monon (peti monon); sen ion prononci (diri); barketo (boato).

Pri la prepozicio SEN, oni instruis min, ke mi ne uzu ĝin antaŭ la infinitivo.

Por internacia legantaro, alia problemo estas la personaj nomoj, kiuj, ĉar nekutimaj, ne vekas tujan komprenon, ekz: Solono, Taso, Milto estas viroj, sed Panajo... estas knabino. Dimitri estas viro, sed Teoni, Roksani, Joti, Danai estas virinoj. Al romanoj tre bone sidus unuapaĝa glo-sareto por la nomoj.

Resume, malgraŭ la lingvaj makuletoj, ne tro videblaj ĉar solvitaj dise en 130-paĝa teksto, la romano estas klare, facile, flue legebla kaj presita sur bona papero. Aĉetebla ĉe la aŭtorino: Despina Patrinu, Piru 54, Ateno 505, Grekujo.

Salvador Gumá

## ESPERANTO EN RADIO

Generalaj informoj pri diversaj disaŭdigoj en Esperanto. En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich.

*Pola Radio* — Ĉiutage

05.00-05.30 Varsovio, 200 m (1502 kHz), 50.04 m (5995 kHz), 48,90 m (6135 kHz), 41.27 m (7270 kHz).

15.30-16.00 Varsovio, 41.99 m (7145 kHz), 31.45 m (9540 kHz), 31.01 m (9675 kHz).

21.30-22.00 Varsovio, 200 m (1502 kHz), 50.04 m (5995 kHz), 48,90 m (6135 kHz).

*Pola Radio*, Esperanto-Redakcio Poŝtkesto 46, P1-00950 Warszawa, Pollando.

*Radio Roma* — Dimanĉe

20.00-20.20 Romo, 49.92 m (6010 kHz), 41.24 m (7275 kHz), 41.15 m (7290 kHz).

*Radio Roma*, Esperanto-Fako, Casella Postale 320, I-00100 Roma, Italujo.

*Svisa Radio Internacia* — Ses tagoj semajne

Lunde, Merkredo kaj Vendrede je 13.20 - 13.30 kaj Marde, Jaude kaj Sabate je 22.35 22.45 mezeŭropa tempo. Por la tempo de Greenwich unu horon pli frue.

*Radio Vatikana* — Dimanĉe 21.05-21.15, Jaŭde 7.15-7.30

Mezlonga ondo (ĉiudirekten: kHz 1529) kaj sur la kurtondoj: kHz 6190, 7250 kaj 9645, en la direkto de Eŭropo. kHz 9625, 11705 kaj 15120 en la direkto sud Afriko. *Radio Vaticana*, Esperanto-redakcio, 00120 Città del Vaticano.

*Radio Vieno* — Sabate, Dimanĉe

16.45-16.55, sabate, Vieno, 48.74 m (6155 kHz), 16.87 m (17.780 kHz).

05.45-05.55, dimanĉe, Vieno, 48.74 m (6155 kHz), 41.64 m (7205 kHz), 16.85 m (17.800 kHz).

Esperanto-Redakcio de ORF, P.O. Box 700, A-1041 Wien, Austria.

*Radio Zagreb* — Vendrede

23.05-23.20, Zagrebo, 264 m (1163 kHz). *Radio Zagreb*, Esperanto-Fako, Jugoslavio.

*Radio Sabadell* — Merkredo

21.00-21.15, Sabadell, 203 m (1475 kHz). *Radio EAJ* 20, Sabadell, Hispanujo.

*Radio la Voz de Valencia* — Vendrede

23.00-23.15, Valencio, 358 m (836 kHz), *La Voz de Valencia*, Hispanujo.

*Populara Radio de Zaragoza* — Marde

22.30-23.00, Zaragoza, Mezlonga ondo (1134 kHz) mod. frekv. (97,8 MHz).

*Radio Popular*, Esperanto, Poŝtkesto 322, Zaragoza, Hispanujo.

*Radio Clube de Sorocaba* — Lunde

00.00-01.00, Sorocaba, 278 m (1080 kHz). *Radio Clube de Sorocaba*, rua São Bento 190, BR-18100 Sorocaba, Brazilo.

*Radio Pekino* — Dimanĉe, Vendrede, Sabate

11.00-11.30, dimanĉe, Pekino, 47 m, 40 m, 30 m.

12.30-13.00, Pekino, 30 m, 25 m, 19 m.

20.00-20.30, vendrede, Pekino, 43 m, 33 m, 31 m, 25 m.

11.00-11.30, sabate, Pekino, kiel dimanĉe.

12.30-13.00, Pekino, kiel dimanĉe.

20.00-20.30, Pekino, kiel vendrede. *Radio Pekino*, Esperanto-Fako, Pekino, Pop. Resp. Ĉinio.

# V - a INTERNACIA KONFERENCO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Okazonta en Ateno, Grekujo, de la 8-a ĝis la 15-a de septembro 1979

Korespondadreso:  
S-ino Adda Sakellaropoulou  
Sokratous 48, Ominia, ATHENO (101)  
Grekujo

Konferencejo:  
Universitata Domo de la Nacia Organizo  
Reĝo Paulo

## ĈEFTEMO DE LA KONFERENCO

«Instruado de la Internacia Lingvo Esperanto (lerneja kaj eksterlerneja) kun aparta konsidero al la situacio en Eŭropo.»

La ĉeftemo estos pritraktita en formo de prelegoj kun postaj diskutoj. Estas antaŭ-viditaj 4 - 5 prelegoj de kompetentaj specialistoj.

Aldone al la ĉeftemo, la Konferenco pritraktos nombron da aktualaj demandoj de la Neŭtrala Esperanto-Movado.

---

Dum la Konferenco okazos ankaŭ kunveno de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj kaj ev. de aliaj fakaj organizoj.

---

La Organiza Komitato preparas aron da interesaj kulturaj aranĝoj, ekskursoj kaj distraĵoj.

## PROVIZORA PROGRAMO

pri distroj kaj ekskursoj

8 septembro: Interkona Vespere.

9 septembro:

matene — Solena Inaŭguro.

vespere — Enurba ekskurso.

10 septembro: Greka Vespere. Popolaj dancoj en teatro de Dora Stratou.

11 septembro: Bankedo.

12 septembro: Duontaga ekskurso al promontoro Sunio.

13 septembro: Tuttaga ekskurso al la fama antikva orakolejo Delfi.

14 septembro: Prezento de Atena Festivalo.

15 septembro: Solena Fermo de la Konferenco.

NE FORGESU:

---

Frua aliĝo al la Konferenco estos grava helpo por la Organiza Komitato.

---

La nova statutprojekto de UEA fontas el la hamburgaj eventoj, kiel antaŭvidite en *Hamburgo en Retrospektivo*. Legu ĝin por informiĝi kaj atentigu viajn geamikojn!

---